# PREĜOSEMAJNO
# POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

18.-25.01.2013.

„Kion la Eternulo postulas de ni?”
*(Miĥ 6, 6-8)*

Kun kio mi povas stariĝi antaŭ la Eternulo, kliniĝi antaŭ Dio en la alto? ĉu mi stariĝu antaŭ Li kun bruloferoj, kun jaraĝaj bovidoj? Ĉu al la Eternulo faros plezuron miloj da ŝafoj aŭ sennombraj torentoj da oleo? ĉu mi donu mian unuenaskiton pro mia krimo, la frukton de mia ventro pro la peko de mia animo? Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio.

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:

- Antonio De Salvo, Guidonia, Italio
- Bernard Schwaiger, Arnstadt, Germanio
- Bogusłav Sobol, Milanówek, Pollando
- Daniel Chevalier, Ecquevilly, Francio
- Doris Legat, Dornbirn, Aŭstrio
- Edvige Ackermann Tantin, Trieste, Italio
- Mons. Gabriel Anda, Edea, Kamerunio
- Giovanni Daminelli, Sesto S. Giovanni, Italio
- Karl Reinisch, Graz, Aŭstrio
- Louis Jealand, Le-Mans, Francio
- Marija Belošević, Zagreb, Kroatio
- Mike Leon, Lower Hutt, Novzelando
- Paola Birgit Giommoni, Arezzo, Italio
- Pavol Petrik, Pečovská Ves, Slovakio
- Stanisław Śmigielski, Kędzierzyn-Koźle, Pollando
- Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos, Serra (Espírito Santo), Brazilo / Novico de Kongregacio "Misiiistoj Kombonianoj", Sahuayo (Michoacán), Meksikio

Reviziis: Antonio De Salvo

Kompilis kaj grafike aranĝis: Marija Belošević

La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)

Estimataj,

En la manoj vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de dekkvinopo de bonvolaj personoj kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montras propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „Ke ĉiuj estu unu“. Do, la laboro okazis jam la duan jaron sinsekve. Ne pretendante grandecon, tamen oni povas konstati ke la ĉijara teamo iel montras la universalecon, tutglobecon en la pozitiva senco!

Certe pluraj inter vi ĉeestos lokajn preĝokunvenojn kaj eble en la manoj tenos tiujn tekstojn en propra lingvo. Pro tio certe iuj starigos demandon kial la traduko al Esperanto estis farita?
Mi deziras memorigi vin, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la ttt-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, surbaze de tiuj tekstoj baziĝis ankaŭ la Ekumenaj diservoj dum la UK en Bjalistoko kaj Hanojo.

Ĉi tiu kompilaĵo do havas pluran utileblecon. Jen kelkaj ideoj:

- dum la Preĝosemajno, en via loko vi povos kolekti Esperantistojn je E-lingva preĝo kaj meditado super la tekstoj (ne forgesu „kie estas du aŭ tri kolektitaj...“)
- preĝorondoj jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno
- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj
- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-aranĝoj, ĉar necesas nur elekti „tagon“ kaj okazigi ekukumenan preĝokunvenon; grandaj aranĝoj kiel Universala Kongreso, kaj simile jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo

Gravas la mencio, ke la tekstoj ne estas nur por la semajno inter la 18a kaj 25a de januaro. Libere uzu ilin dum la tuta jaro, ĉar preĝi neniam sufiĉas.

Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.

Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuaĝiga, kaj malfermis perspektivon pori u estonta simila laboro.

Paco kaj bono!

Marija Belošević, vicprezidantino de IKUE

## TEOLOGIA- PAŜTISTA ENKONDUKO
## „Kion la Eternulo postulas de ni?”
## *(kp Miĥ 6, 6-8)*

La Studenta kristana movado en Indio (*Student Christian Movement en India, SCMI*), por celebri sian centjariĝon ricevis la taskon pretigi la materialon por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj, kaj ĝi, siavice, kuntrenis la federacion la Tut-Hindia Katolika Universitata Federacio *India Catholic University Federation (AICUF)* kaj la konsilion *National Council of Churches in India (NCCI).* Dum la prepara periodo, pripensante la signifon de la Preĝosemajno por la unueco de la Kristanoj, oni decidis ke, en la nuna situacio de grava maljusteco rilate al la *Dalitoj* (*Parioj* aŭ „Netuŝebluloj”) en Hindio kaj en la Eklezio, la serĉado de la videbla unuiĝo, ne povus esti disigita de la disfaligo de la kastoj kaj de la atentigo al la kontribuo al la unueco fare de la plej malriĉaj inter la malriĉuloj.

La klaso de la *Dalitoj* en la hinda medio, estas konsiderata „ekster la kasto”. Ili estas la plej grave frapitaj de la kasto-sistemo, kiu estas rigida koncepto de socia tavoligo, bazita sur principoj de rita pureco kaj de infekto. En la sistemo de la kastoj, la klasoj estas konsiderataj „pli altaj” aŭ „pli malaltaj”. La *dalitaj* komunumoj estas taksataj la plej infektitaj kaj infektintaj, pro tio ili estas metitaj ekster la kasto-sistemon, kaj en la pasinteco estis difinitaj eĉ „netuŝeblaj”. Pro tiu kasto-sistemo, la *Dalitoj* estas socie elpelitaj, politike sub-reprezentataj, ekonomie ekspluatataj kaj kulture submetitaj. Ĉirkaŭ la 80% de la hindaj kristanoj devenas el *Dalitoj*.

En la 20-a jarcento, malgraŭ rimarkinda progreso, en la hindiaj eklezioj pludaŭras la doktrinaj disdividoj hereditaj de Eŭropo kaj de aliaj landoj. En Hindio, eĉ pli ol la kasto-sistemo, estas evidentigita la malĉeesto de unueco inter la eklezioj kaj ene de ilia sino. Tiel sistemo, kiel la rasapartismo, la rasiismo kaj la naciismo, grave elprovas la unuecon de la kristanoj en Hindio, kaj konsekvence, la moralan kaj eklezian atestadon de la Eklezio, kiel unika Korpo de Kristo. Pro tio, ke ĝi estas kialo de disdivido inter la eklezioj, la kasto-sistemo estas grava doktrina problemo. En tiu situacio, ĉi-jare, la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj, nin instigas pripensi la famkonatan tekston de *Miĥa* 6,6-8, kies centra temo estas la demando pri tio, kion la Sinjoro postulas de ni. La sperto *Dalito* rolas kiel klara pruvo, en kiu evidentiĝas la teologia meditado pri tiu biblia temo.

Miĥa estas unu el la dek du minoraj profetoj de la Malnova Testamento, kiu profetis proksimume inter la jaroj 737 kaj 690 en Judeo. Li devenis el Moreŝeto, urbeto sudokcidente de Jerusalemo, kaj predikis dum la regnoj de Jotam, Aĥaz, kaj Ĥizkija, reĝoj de Judeo (kp. Miĥ 1,1). Li vivis en la sama situacio politika, ekonomia kaj religia de sia samtempano Jesaja, kun kiu, li estis atestanto de la detruado de Samario kaj de la invado de la Suda Regno fare de la Reĝo de Asirio en la jaro 701 aK. Lia doloro kaj lia ploro pri la kondiĉo de la popolo inspiris la tonon de lia libro, kaj li senbridigis sian koleron kontraŭ la estroj (kp. *Miĥ* 2,1-5) kaj la pastroj, kiuj perfidis sian popolon. La libro de Miĥa, koncernas la literaturan tradicion de la profetado. En la kerno de lia mesaĝo estas la juĝo. La libro dividiĝas en tri sekciojn, kiuj skizas irvojon: de la ĝenerala juĝo (ĉap-oj 1-3), al la rivelado de la savo (ĉap-oj 4-5), ĝis la vorto de la juĝo kaj la celebro de la savo (ĉap-oj 6-7). En la unua parto, Miĥa akre kritikas tiujn, kiuj ekspluatas sian aŭtoritaton, ĉu politikan, ĉu religian, por misuzi sian povon kaj priŝteli la malriĉulojn: „Vi deŝiras de ili ilian haŭton kaj la karnon de iliaj ostoj” (3,2) kaj „la juĝistoj juĝas pro subaĉeto” (3,11). En la dua parto de la libro, Miĥa instigas la popolon al pilgrimado „Ni iru supren sur la monton de la Sinjoro [...]. Li instruos nin pri niaj devoj kaj ni lernos kiel konduti” (4,2). La juĝo de Dio kune kun la instigo atendi la savon kun la espero kaj la fido en Dio montriĝas en la tria parto: „Sinjoro, Vi pardonas niajn malbonagojn kaj preterlasas niajn pekojn” (7,18). Ĉi tiu espero centriĝas sur la Mesio, kiu „alportos la pacon” (5,4) kaj kiu venos el Bet-Leĥemo (kp. 5,1) por alporti la savon „ĝis la randoj de la tero” (5,4). Miĥa esence, vokas ĉiujn naciojn de la mondo entrepreni ĉi tiun pilgrimadon, partopreni en la justeco kaj la paco, kiuj estas ilia savo.

La forta alvoko de Miĥa al la justeco kaj al la paco koncentriĝas en la ĉapitroj 6, 1-7, 7, kies parto konsistigas la temon de la Preĝosemajno. Li metas la justecon kaj la pacon en la historion de la rilato inter Dio kaj la homaro, sed li insistas en la deklaro, ke la historio necesas kaj postulas fortan etikan engaĝiĝon. Kiel multenombraj profetoj vivintaj en la tempo de la monarkio de Izraelo, Miĥa memorigas al la popolo, ke Dio savis ilin el la egipta sklaveco kaj alvokis ilin, pere de la interligo, vivi en socio bazita sur la digno, la egaleco kaj la justeco. Pro tio, la vera fido en Dio ne estas disigebla de la persona sankteco kaj de la serĉado de la socia justeco. La savo de Dio el la sklaveco kaj el la ĉiutaga humiliĝo, postulas de ni „praktiki la justecon, serĉadi la bonfaron, kaj vivi en humileco antaŭ nia Dio" (6,8), kaj tion postulas pli ol kulton kaj oferaĵojn (kp. 6,7).

La malagrabla situacio, kiun la popolo de Dio devis alfronti en la epoko de Miĥa, estas komparebla kun la nuna situacio de la *dalita* komunumo en Hindio. Ankaŭ la *Dalitoj* devas alfronti la subpremon kaj la maljustecon de tiuj, kiuj intencas neagnoski iliajn rajtojn kaj ilian dignon. Miĥa komparas la avidecon de tiuj, kiuj ekspluatas la malriĉulojn, al tiuj pri kiuj li diras: „Vi voras mian popolon. Vi lin senhaŭtigas, dispecigas liajn ostojn" (3,3). En la malakcepto de ritaroj malriĉigitaj de la malĉeesto de sento de justeco, Miĥa montras, kia estas la vera atendo de Dio: la justeco estu la kerno de nia religio kaj de niaj ritoj.

Lia mesaĝo montriĝas elstare profeta, en scenejo en kiu la diskriminacio damaĝa al *Dalitoj* estas rajtigita surbaze de la religio kaj de principoj de rita pureco kaj de infekto. La fido akiras aŭ perdas sian signifon laŭ sia rilato kun la justeco. Hodiaŭ, rilate la dalitan situacion, la insisto de Miĥa pri la morala elemento de nia fido, pridemandas nin pri tio, kion Dio vere postulas de ni: ĉu nur oferdonojn aŭ ĉu iri kun li sur la vojo de la justeco kaj de la paco?

La kristana disĉiplado implicas la paŝadon sur la vojo de la justeco, de la mizerikordo kaj de la humileco. La metaforo de la „paŝado" estis elektita por kunligi la temojn de la tagoko, por ke la ideo de la paŝado, kiel ago efektiva, intenca kaj daŭra, vehiklu la dinamisman senton, kiu karakterizas la kristanan disĉipladon. Krome, la temo de la 10a Ĝenerala Kunveno de la Ekumena Konsilio de la Eklezioj 2013, kiu okazos en Busan, Sud-Koreio, - „Dio de la vivo, gvidu nin al la justeco kaj al la paco"- reeĥas la bildon de Dio Triunua, kiu akompanas la homaron kaj iras en la historio, invitante ĉiujn popolojn paŝi kune, komunece.

La ok temoj de la Semajno, rilatas malsamajn irmanierojn, helpante nin enfokusigi la plurajn dimensiojn de vera disĉiplado, kiu laŭiras la vojon de la justeco kondukanta al la vivo (kp. *Sen* 12,28a).

**LA UNUA TAGO: PAŜI EN DIALOGO**

Ni prikonsideras la gravecon de la praktikado de la dialogo kaj de la konversacio kiel ilon por superi la barojn. Kaj en la ekumenismo, kaj en la batalo por la liberigo de la popoloj en la tuta terglobo, la kapablo paroli kaj aŭskulti estas rekonata kiel esenca elemento. En la sincera konversacio ni povas pli klare rekoni Kriston.

**LA DUA TAGO: PAŜI KIEL KORPO DE KRISTO**

Rekonante la solidarecon inter la krucumita Kristo kaj la „disŝiritaj personoj" de la mondo, kiel la *Dalitoj*, ni klopodos, kiel kristanoj, kune lerni esti mem parto de ĉi tiu solidareco en pli profunda maniero. Devas esti kunligo inter la Eŭkaristio kaj la justeco, kaj la kristanoj estas petataj malkovri konkretajn manierojn de la eŭkaristia travivado en la mondo.

**LA TRIA TAGO: PAŜI AL LA LIBERO**

Oni instigas nin, rekoni la streĉojn de la subpremataj komunumoj de la tuta terglobo, kiel la *Dalitoj* en Hindio, kiam ili protestas kontraŭ ĉio, kio sklavigas la homan estaĵon. Kiel kristanoj engaĝitaj al unueco ĉiam pli vasta kaj kune partoprenata, ni lernu, ke, forigi tion, kio disigas la personojn unu de la alia, estas esenca elemento de la pleneco de la vivo kaj de la libero en la Spirito.

**LA KVARA TAGO: PAŜI KIEL FILOJ DE LA TERO**
La konscio pri nia loko en la kreitaĵo de Dio, nin alproksimigas unu al la alia, ĉar ni ekkonscias pri la interdependeco inter ni kaj de ni kun la tero. Konsiderante la urĝan vokon al la media protekto kaj al justa kunpartigo de la fruktoj de la tero, la kristanoj estas vokataj travivi vivon de aktiva atestado, en la spirito de la jubilea jaro.

**LA KVINA TAGO: PAŜI KIEL AMIKOJ DE JESUO**
Ni primeditas la bibliajn bildojn de la amikeco kaj de la homa amo, kiel modelojn de la dia amo. Rigardi nin mem kiel amatajn amikojn de Dio havas konsekvencojn en la rilatoj ene da la komunumo de Jesuo. En la Eklezio, komunumo en kiu ĉiuj, egalmezure, estas la amataj amikoj de Jesuo, ĉiu ekskludanta baro estas senkohera.

**LA SESA TAGO: PAŜI PRETER LA BARILOJ**
Paŝi kun Dio signifas paŝi preter la bariloj, kiuj disigas kaj vundas la filojn de Dio. La bibliaj legadoj de ĉi tiu tago citas la diversajn manierojn por superi la homajn barilojn kaj kulminas per la instruo de la apostolo Paŭlo: „Per la bapto, fakte vi estis kunigitaj al Kristo. Neniel gravas esti Judo aŭ pagano, sklavo aŭ liberulo, viro aŭ virino; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo” (*Gal* 3,28).

**LA SEPA TAGO: PAŜI EN LA SOLIDARECO**
Paŝi humile kun Dio signifas paŝi solidare kun tiuj, kiuj batalas por la justeco kaj la paco. Paŝi en la solidareco havas sekvojn ne nur por la unuopa kredanto, sed ankaŭ por la naturo mem kaj por la misio de la tuta kristana komunumo. La Eklezio estas vokita kaj kapabligita partopreni ĉies suferon, pere de la subteno kaj zorgado al la malriĉuloj, al la bezonuloj, al la forpuŝitoj. Ĉi tio estas implicita en nia preĝo por la unuiĝo de la kristanoj.

**LA OKA TAGO: PAŜI KUNE EN LA CELEBRADO**
En ĉi tiu tago, la bibliaj tekstoj parolas pri celebrado, ne kun la signifo celebri la atingon de la celo, sed kiel signo de espero en Dio kaj en lia justeco. Sammaniere, la reapero de la Preĝosemajno por la unuieco de la kristanoj estas nia signo de espero, ke la unueco estos akirita en la tempoj kaj per la iloj de Dio.

Tio, kion Dio postulas de ni hodiaŭ, estas paŝi sur la pado de la justeco, de la mizerikordo kaj de la humileco. Ĉi tiu disĉiplada paŝado postulas la ekiron sur la mallarĝa vojo de la Dia Regno, kaj ne sur la aŭtoŝoseoj de la hodiaŭaj imperioj. Ekpaŝi sur ĉi tiu pado de justeco antaŭvidigas la malmildecon de la batalo, la izoliĝon kunigitan al la protesto kaj la riskon enigitan en la rezisto kontraŭ „aŭtoritatoj kaj mondpotenculoj” (*Efe* 6,12). Tio okazas precipe kiam tiuj, kiuj parolas nome de la justeco, estas taksataj kiel homoj, kiuj estigas problemojn kaj detruas la pacon. En ĉi tiu perspektivo ni devas kompreni, ke la paco kaj la unueco estas radike plenumitaj nur se baziĝintaj sur la justeco.

Agorde kun la temo de la Preĝosemajno, en kies fokuso estas la *dalita* komunumo en Hindio, ĉi tiu disĉiplada paŝado estas, metafore „paŝado akompanata de la ritmo de la *dalita* tamburo”. En la hindaj vilaĝoj, multenombraj *dalitaj* komunumoj estas kunligitaj kun la sono de la rita tamburo. La sono de la *dalita* tamburo ne nur alvokas la dian ĉeeston, sed certigas sekuran transiron de la komunumo dum la transiraj tempoj, forigante tion, kio estas konsiderata malbono. Hodiaŭ, la perkutado de la *dalita* tamburo estas taksata kiel celebro de la kulturo kaj de la identeco de tiuj komunumoj.

Pro ĉi tiuj motivoj, kiam ni parolas pri „paŝado ritme akompanata de la *dalita* tamburo”, ni rilatas al formo de disĉiplado daŭre memorigita de la ĉiama ĉeesto de Dio inter la plej marĝenigitaj. Ĝi alvokas ankaŭ al formo de disĉiplado, kiu rekonas la persistan forton de la *Dalitoj* fronte al la malbono kaj en la kontribuo al la prospero de la plej ampleksa komunumo. Krome, oni memorigas al ni formon de disĉiplado, kiu asertas la *dalitajn* kulturon kaj identecon, kiel neatenditan spacon, en kiu oni travivas la ĉeeston de Kristo (kp.

Mat 25,40). Tia disĉiplado nin kondukos al vera solidareco kaj al formoj de kristana unueco liberigita de maljustaj diskriminacioj kaj ekskluzivigoj.

Unu el la metioj kunligitaj kun kelkaj *dalitaj* komunumoj estas „kudri la sandalojn”. Estante unu el la vivrimedoj de la *Dalitoj*, ĝi estas simbolo de ilia sperto kunigi paciencon kaj esperon en ekzistado, kiu havu signifon, meze de humiligaj kaj malhumanigaj kondiĉoj. La espero de niaj primeditoj de la tagoko estas, ke la *dalitaj* spertoj fariĝu por ni kiel sandaloj, kiujn ni surmetas en nia irado sur la pado de la justeco, farante tion, kion Dio postulas de ni. „Ia ajn antaŭjuĝa esprimo bazita sur la kastoj, rilate al la kristanoj - asertis Johano Paŭlo la 2a[1] estas kontraŭ-atesto de la aŭtentika homa solidareco, minaco al la pura spiriteco kaj grava baro kontraŭ la evangeliza misio de la Eklezio”. Povu nia Dio de justeco, unuiĝo kaj paco igi nin kapablaj esti aŭtentaj signoj de homa solidareco, fortikigante nin en „fari tion, kion Li postulas de ni“.

**Preparado de la materialo por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj 2013**

Ĉi tiu origina teksto de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis preparita de la Studenta kristana movado en Hindio (Student Christian Movement in India, SCMI), en konsultado kun la Tut-Hindia Katolika Universitata Federacio (All India Catholic University Federation, AICUF) kaj kun la Nacia konsilio de la Eklezioj en Hindio (National Council of Churches in India, NCCI). Ni deziras danki ĉiujn, kiuj kontribuis en ĝi, precipe:

- Lia Eminenco la Metropolito D-ro Geevarghese Mar Coorilos, SCMI (Malankara Jacobites Syrian Orthodox Church),
- S-ino Bernadine, AICUF (Catholic Church),
- D-ino Aruna Gnanadason, Senior Friend, SCMI (Church of South India),
- D-ro Peniel Rufus Rajkumar, United Theological College (Church of South India),
- Fr. Vineeth Koshy, NCCI (Malankara Orthodox Syrian Church),
- S-ino Anita Hepsibah, SCMI (Church of South India),
- S-ino Chrisida Nithyakalyani, SCMI (Tamil Evangelical Lutheran Church),
- Rev. Raj Bharath Patta, SCMI (Andhra Evangelical Lutheran Church).

La teksto preparita de ĉi tiu loka Grupo, estis poste reviziita por la fina redakto de la Internacia Komisiono nomumita de la Komisiono Fido kaj Konstitucio (Ekumena Konsilio de la Eklezioj) kaj de la Papa Konsilio por la Antaŭenigo de la Unuiĝo de la Kristanoj (Katolika Eklezio). La Internacia Komisiono renkontiĝis kun SCMI kaj ĝiaj anoj en septembro 2011 en Bangalore, Hindio, kaj deziras etendi sian dankon al SCMI por la afabla gastigo de la renkontiĝo.

[1] Johano Paŭlo la 2a al la episkopoj de Madras-Mylapore, Madurai kaj Pondicherry-Cuddalore, la 17an de novembro 2003

## EKUMENA CELEBRADO DE LA DIA VORTO

„Kion la Eternulo postulas de ni?”
**(kp. Miĥ 6, 6-8)**

### Enkonduko al la Celebrado

La ĉijara celebrado reflektas la junulecan aspekton de la Movado de Kristanaj Studentoj de Hindio. Ĝi konsideras la realan vivon de la *Dalitoj* kaj donas eblon partopreni ilian spiritecon. Apartaj elementoj de la diservo venas de la kunteksto travivata de la *Dalitoj* de Hindio, kaj tio inkluzivas la uzadon de tamburoj kaj la *„bhajan”*, kio estas tiea maniero kanti tekstojn kiuj proklamas sian kredon je Dio. Tria tipa elemento estas la disparolado de la kred-atesto, kio montras la spiritecon de la *Dalitoj* en sia lukto por justeco, en la amo al bonfaroj kaj en la modesta estado antaŭ Dio (laŭ Miĥ 6, 6-8). La diservon oni konkludas per la signo de disdivido, kio estas kutima en la komunumoj de *Dalitoj*, kaj ĉikaze estas esprimita per la disdivivo de ĝermantaj semoj aŭ de arbetoj, kiuj estas simbolo de nia alvoko al espero kaj transformiĝo.

Dum la Preĝosemajno la kristanoj tra la tuta mondo, per la ekumena kunuleco, profundigas tion, kion signifas fari justecon, ami la fidelecon kaj vojiri humile kun Dio. Tiun temon oni disvolvas dum la ok tagoj per la metaforo de la vojirado. Laŭ la komunumoj de *Dalitoj*, la vojirado al la liberiĝo estas nedisigebla de la vojirado al la unueco. Tial, nia vojirado kun la *Dalitoj* en ĉi tiu Semajno – kaj kun ĉiuj, kiuj deziras la justecon – estas parto de la preĝado por la unueco de la kristanoj.

La kristanoj de Hindio devas malakcepti la dividon je kastoj, same kiel la kristanoj de la tuta mondo ne devas akcepti dividojn inter si: „Ĉu Kristo estas dividita?” (1 Kor 1, 13). Tial ni unuiĝas en la celebrado por preĝi por tiu unueco, kiun Kristo deziras al sia Eklezio, kaj ni estas alvokitaj faligi la murojn de divido kiuj ekzistas inter ni kaj inter ĉiu homo.

### Strukturo de la diservo

La organizado de la celebrado enhavas ses elementojn; malfermo, laŭdado kaj dankesprimo, pek-konfeso kaj konfid-proklamo, liturgio de la Vorto kaj kred-atesto, propetaj preĝoj, beno kaj adiaŭo.

I. ENKONDUKAJ RITOJ

La celebrado komenciĝas per preludo kaj tamburado, kiuj estas simboloj kaj de la celebro de la vivo kaj de la rezisto kontraŭ la subpremado en la komunumoj de *Dalitoj* en Hindio. Ili estas signoj de persistado de ĉiuj komunumoj kiuj luktas por justeco kaj liberiĝo en la tuta mondo. Modelon de la tamburoj de la dalitoj oni povas esplori ĉe http://www.youtube.com/watch?v=7HDt7OmzUdw&feature=related. La komunumoj kiuj ne uzas tamburojn povas serĉi alian agon aŭ instrumenton, kiu esprimu la saman intencon.

La fonto de la alvoko estas trovita en la skribaĵoj de la fama hindujano, kiu ricevis la premion Nobel, Rabindranath Tagore. La malfermon oni konkludas per „Bhajan”, kant-preĝo, kiun iu gvidanto kondukas kaj la kunveno ripetas kiel preĝo (en teluga lingvo). Ekzemplojn de kantoj „bhajan” oni povas trovi ĉe interreto.

II. LAŬDO KAJ DANKO

III. KONFESO DE PEKO KAJ CERTECO PRI PARDONO

Kiel signo de konfido, la kunveno estas alvokita vojiri por disdividi signon de paco kaj, dume, oni povas ludi instrumentan melodion.

IV.LITURGIO DE LA VORTO KAJ ATESTADO DE LA KREDO

La liturgio de la Vorto komenciĝas per la legado de la baza teksto de la Preĝosemajno: Miĥa 6, 6-8. Post tio, okazas kred-atesto rilate al okazaĵo de la reala vivo, kiu okazis al virino nome Sarah, de la komunumo de la *Dalitoj*. Tio okazis en la jaro 2008 en Khandamal, ŝtato Orissa, centre de Hindio, kie, dum unu monato, okazis eksplodo de perfortado, kiam kristanoj (plejparte *Dalitoj*) estis atakataj de hinduistaj ekstremistoj. Preĝdomoj kaj kristanaj loĝejoj estis detruitaj. Orissa estas unu el la partoj plej malriĉaj de Hindio, tradicie rilatigita al la partoj plej diskriminaciitaj de la societo. La rezulto de tiu perfortado estis 59 mortintoj, 115 kristanaj eklezioj detruitaj, familioj disigitaj kaj 50 mil kristanoj sen hejmo serĉis rifuĝejon en la arbaroj kaj poste en la rifuĝkampoj aranĝitaj de la hindia estraro. Inter 80 kaj 90% el la kristanoj en Hindio estas *Dalitoj* konvertiĝintaj. Kiel Sarah, en la historio, la plej granda parto de la *Dalitoj* ne ricevis stimulojn por fariĝi kristanoj, laŭ oni diras kelkfoje; granda kvanto da *Dalitoj* konvertiĝis tiam, kiam ili iris al la misioj serĉante rifuĝejon pro la subpremanta sistemo de kastoj. Ili petis la liberecon, kiun ili kredis, ke ili povus elĝui sub la kuraca potenco de la Dio, kiu estis liberigema.

Similan kred-ateston oni povas prezenti nun, en la kunteksto de ĉiu popolo.

Tiam, oni invitas la kunvenon primediti tiajn kred-atestojn dum ĉiuj daŭre aŭskultas la Vorton de Dio.

V. PROPETAJ PREĜOJ

VI. BENO KAJ FORSENDO

Tipa kutimo de la komunumoj de la *Dalitoj* estas la disdivido de la manĝaĵo; do, ni sugestas, ke okazu komuna manĝado fine de la celebrado.

C = CELEBRANTO
L = LEGANTO
Ĉ = ĈIUJ

## I. ENKONDUKAJ RITOJ

En la ritmo de tamburo de *Dalitoj* aŭ akompanata de iu alia muzikilo.

La ĉefcelebranto bonvenigas la kunvenon.

Invito al la preĝo.

C: La Sinjoro diris: „Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili.“ (Mat 18, 20). Ni eniru la silenton por povi konsciiĝi pri la ĉeesto de la Triunua Dio inter ni.

Momento de silento

*Alvoko*

C: Kie la menso estas sentima kaj oni marŝas kun levita kapo, kie la kono estas libera, kie la mondo ne estis dispecigita de mallarĝaj hejmaj muroj, kie la vortoj elvenas el la profundo de la vero, kie senlaca batalado etendas siajn brakojn al la perfekteco, kie la klara fluo de la rezono ne perdiĝis en la arida sablo de la dezerto de la senvivaj kutimoj, kie la menso estas kondukata de vi al ĉiam pli ampleksaj horizontoj de penso kaj de agado, al tiu ĉielo de libereco, Patro mia, mia lando vekiĝu! (Rabindranath Tagore)

*Bhajan*
Oni plenumas devotecan kanton, side aŭ surgenue, aŭ alian taŭgan himnon aŭ kanton.

| | |
|---|---|
| Saranam | Vi estas nia rifuĝo, |
| Divya jyotiye, saranam | Dia lumo, Vi estas nia rifuĝo. |
| Shanthi dathane, saranam | Donanto de paco, Vi estas nia rifuĝo |
| Karuna murthiye, saranam | Sinjoro de mizerikordo, Vi estas nia rifuĝo |
| Saranam, saranam. | Vi estas nia rifuĝo |

## II. LAŬDO KAJ DANKO

*La ĉefcelebranto invitas la ĉeestantaron manpreni dum oni eldiras ĉi preĝojn por tiel krei senliman homan ĉenon de unueco kaj solidareco.*

C: Ni laŭdas vin, kara Dio, ĉar vi kreis nin en ni diverseco. Pro la donaco de niaj multaj kulturoj kaj lingvoj, pro la diversaj esprimoj de la kredo, de la kutimoj, de la tradicioj kaj de la etnoj, ni dankas vin! Ni dankas vin pro la multaj ekleziaj tradicioj kiuj gardis niajn komunumojn aktivaj kaj fortaj ankaŭ en lokoj kie ili estas malplimultoj. Instruu al ni celebri niajn diversajn idebtecon kaj tradiciojn, tiel ke estiĝu interligoj de amikeco kaj komuenco kiuj konduku nin al pli granda unueco.
**Ĉ: Kiel bele, ke la gefratoj vivas kune.**

C: Ni vin laŭdas, Sinjoro Jesuo Kristo, ĉar vi repacigis nin kun Dio kaj kun la aliaj pere de via Morto kaj Resurekto, kaj ĉar vi instrui al ni respekti la dignon kaj la valoron de ĉiu homa estulo. Ni dnakas vin, ĉar vi envenas en nian ĉiutagan vivon, kaj nin vokas travivi la solidarecon kun tiuj, kies digno estas rompita de poltikaj, sociaj kaj ekonomiaj strukturoj. Instruu al ni celebri la mesaĝon de espero, ke en vi ni povas superi la tutan malbonon de la mondo.
**Ĉ: Kiel bele, ke la gefratoj vivas kune.**

C: Ni laŭdas vin, Sankta Spirito, pro la donaco de la reciproka konfido kaj de la solidareco, kiu estis nia heredaĵo kiel popoloj kaj eklezioj. Instruu al ni valorigi la interligojn de unueco

kiujn ni ĝuas, dum ni serĉas vian daŭran ĉeeston meze de ni. Estu vi nia inspiro en la vojo al la plena kaj videbla unueco inter ni kaj kun ĉiuj popoloj kaj movadoj engaĝitaj en la batalado por la vivo.
**Ĉ: Kiel bele, ke la gefratoj vivas kune.**

## III. KONFESO DE PEKO KAJ CERTECO PRI PARDONO

C: Ni scias, ke en Kristo ni jam estas unu. Malgraŭ tio, la homa malforteco igis ke ne ĉiam ni atestis ĉi tiun realon. Ni nun konfesu nian pekon pri disiĝo kaj ni serĉu la sanigon de la Sinjoro.

*Momento de silento*

**Ĉ: En humileco ni venas al viaj piedoj, ho kara Jesuo, dum ni memorigas nian pekon kaj la disiĝon pri kiu ni estis respondecaj. Ni konfesas, ke ni ankoraŭ plutenas la malnovajn barilojn de kasto, klaso, etno kaj povo kaj de ĉiuj realaĵoj kiuj plutenas disiĝintaj la kristanojn: Ni petas de vi pardonon ĉar ni ofte utiligis nian historion kaj nian pasintecon kiel eklezioj por diskriminacii nin reciproke, vundante la unuecon al kiu Kristo nin vokis. Pardonu nian mankon de unueco kaj helpu nin persisti en la serĉo de la unueco, en la altvalora nomo de via Filo Jesuo.**

**Preĝpeto**

**Ĉ: Venu nun, Jesuo, mezen de ni, kaj sanigu nian malunuecon. Gvidu nin laŭ la padoj de la justeco, por ke ni ĉiuj povu trovi vivon.**

**Venu nun, Jesuo, mezen de ni, kaj instruu al ni aŭskulti la krion de tiuj kiuj estas relegaciitaj al la marĝenoj.**

**Venu nun, Jesuo, mezen de ni, kaj inspiru nin labori kune kun ĉiuj, kiuj batalas por la liberigo kaj por konstrui la unuecon de via korpo disŝirita. Amen.**

*Certeco pri pardono*

C: Se ni konfesas niajn pekojn, Li estas fidela kaj justa: por pardoni al ni niajn pekojn kaj nin purigi de ĉia maljusteco. (kp. 1 Joh 1, 9).

La ĉefcelebranto invitas la kunvenon dividi ĉi promeson de pardonpeto donante la manon en la signo de la paco unu al la alia. Ĉi momento povas esti akompanata per muzikado.

## IV. LITURGIO DE LA VORTO KAJ ATESTADO DE LA KREDO

*Legaĵo el la Libro de Miĥa (Miĥ 6, 6-8)*

L: Kun kio mi povas stariĝi antaŭ la Eternulo, kliniĝi antaŭ Dio en la alto? ĉu mi stariĝu antaŭ Li kun bruloferoj, kun jaraĝaj bovidoj? Ĉu al la Eternulo faros plezuron miloj da ŝafoj aŭ sennombraj torentoj da oleo? ĉu mi donu mian unuenaskiton pro mia krimo, la frukton de mia ventro pro la peko de mia animo? Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio.

Jen fid-atesto:

*Kiam ili venis por aresti Sarah Digal, ŝi ne estis tie. Jam ŝi estis fuĝinta kun siaj kvin gefiloj kaj sia vivtenata bopatrino, por serĉi sekurecon en la ĝangalo, for je unu kilometro. Tiam ili bruligis ĉion, kion ŝi forlasis: enkadrigitan bildon de Jesuo, Biblion en orija lingvo, kuirilojn, kelkajn vestojn, tukojn kaj kelkajn matojn. Kiam Sarah revenis, sur la pintoj de la piedoj, opiniante esti ekster danĝero, ŝia domo estis forbruligita. Restis nur braĝoj, cindro kaj fumo. La najbaroj venis por plori kune kun ŝi. Sarah ĉirkaŭrigardis, restis rekte staranta, kaj firme tiris sian sarion sur sian kapon. Ŝi ekpreĝis: „Sinjoro, pardonu al ni niajn pekojn. Jesuo, sole Vi estas sankta. Savu nin de nia malfeliĉo. Liberigu nin, Sinjoro!”. La vortoj tumulte elverŝiĝis. La gefiloj de Sarah kuniĝis al ŝi iom post iom. Ŝi ploris dum ŝi petis de la Sinjoro esti liberigata. Kelkaj el ŝiaj najbaroj kaj aliaj ĉeestantoj kuniĝis al ŝi. Estis simpla ligilo de homa kompato kaj forta memorigaĵo, ke nenio povas disigi virinon for de ŝia Dio. „Mi preferas morti anstataŭ ĉesi esti kristanino” diris Sarah tra siaj larmoj. Jen fidela kaj kuraĝa Dalita kristanino!*

*Eventuale plia atestado de la kredo*

C: En la silento ni meditu ĉi atestojn de la kredo kaj kuraĝo. En la Jaro de la kredo ni laŭdas la ateston de nia fratino Sarah kaj de aliaj kristanoj, preĝante ke ilia ekzemplo plifortigu nin sur nia vojo de la kredo.

*Momento de silento*

*Psalmo 86, 11-16*

L: Montru al mi, ho Eternulo, Vian vojon, por ke mi iru en Via vero;
Dediĉu mian koron al la respektado de Via nomo.

Mi dankos Vin, ho mia Sinjoro, mia Dio, per mia tuta koro,
Kaj mi honoros Vian nomon eterne.

Ĉar granda estas Via boneco al mi;
Kaj Vi savis mian animon el la profundo de Ŝeol. –

Ho Dio, fieruloj leviĝis kontraŭ mi,
Kaj anaro da premantoj serĉas mian animon
Kaj ne havas Vin antaŭ si.

Sed Vi, mia Sinjoro, estas Dio kompatema kaj favorkora,
Longetolerema kaj tre bona kaj verama.

Turnu Vin al mi kaj korfavoru min,
Donu Vian forton al Via sklavo,
Kaj helpu la filon de Via sklavino.

*Legaĵo el la Epistolo al Galatoj (Gal 3, 26-28)*

L: Ĉar vi ĉiuj per la fido estas filoj de Dio en Kristo Jesuo. Ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston. Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.

*Legaĵo el la Evangelio laŭ Luko (Luk 24, 13-35)*

L: Kaj jen du el ili iris en tiu sama tago al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalem sesdek stadiojn. Kaj ili interparolis inter si pri ĉio tio, kio okazis. Kaj dum ili interparolis kaj diskutis inter si, Jesuo mem alproksimiĝis kaj iris kun ili. Sed iliaj okuloj estis malhelpataj tiel, ke ili lin ne rekonis. Kaj li diris al ili: Kiaj vortoj estas tiuj, kiujn vi interŝanĝas, dum vi iras? Kaj ili haltis, kun malgaja mieno. Kaj unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al li: Ĉu nur vi sola loĝas en Jerusalem, kaj ne scias tion, kio tie okazis en ĉi tiuj tagoj? Kaj li diris al ili: Kion? Kaj ili diris al li: Pri Jesuo, la Nazaretano, kiu estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo; kaj kiel la ĉefpastroj kaj niaj regantoj transdonis lin por kondamno al morto, kaj lin krucumis. Sed ni esperis, ke li estas tiu, kiu elaĉetos Izraelon. Kaj plie, krom ĉio tio, hodiaŭ estas jam la tria tago, de kiam tio okazis. Ankaŭ mirigis nin iuj virinoj el inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, kaj ne trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ vidis vizion de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas. Kaj iuj el nia kunularo iris al la tombo, kaj trovis tiel, kiel diris la virinoj; sed lin ili ne vidis. Kaj li diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? Kaj komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem. Kaj ili alproksimiĝis al la vilaĝo, kien ili iris, kaj li ŝajnigis al ili, kvazaŭ li pluen iros. Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas. Kaj li eniris, por resti ĉe ili. Kaj dum li sidis kun ili ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili. Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili. Kaj ili diris unu al alia: Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn? Kaj leviĝinte en tiu sama horo, ili reiris al Jerusalem, kaj trovis la dek unu kunvenintaj, kun siaj kunuloj, kaj dirantaj: La Sinjoro vere leviĝis, kaj aperis al Simon. Kaj ili rakontis tion, kio okazis sur la vojo, kaj kiamaniere li rekoniĝis al ili en la dispecigo de pano.

***Homilio / Meditado***

***Kredkonfeso***
*Oni sugestas la kredkonfeson per la „Simbolo de la Apostoloj"*

**Ĉ. Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova,**
**la kreinto de la ĉielo kaj de la tero;**

**kaj je Jesuo Kristo,**
**Lia unu-nura Filo, nia Sinjoro,**
**koncipita per la Sankta Spirito,**
**naskita el Maria la Virgulino,**
**suferinta sub Poncio Pilato,**
**krucumita, mortinta kaj entombigita,**
**sobirinta en la regnon de la morto.**
**La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj,**
**supren-iris al la ĉielo,**
**sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova,**
**de kie Li venos, por juĝi la vivantojn**
**kaj la mortintojn.**

**Mi kredas je la Sankta Spirito,**
**la sankta katolika eklezio,**
**la komuno de la sanktuloj,**
**la pardono de la pekoj,**

**la releviĝo de la mortintoj,**
**kaj la vivo eterna.**
**Amen.**

## PROPETAJ PREĜOJ

C: Irante en dialogo, ni rekonu ĉiujn strebojn de la ekumena Movado survoje al la efektivigo de la unueco, kiun Kristo volas por la Eklezio.

**Ĉ: Sendu vian Spiriton por plifortigi nian decidemon kaj igi pli profunda nian interparolon por plenumi en ni la preĝon de Jesuo.**

C: Irante kiel korpo de Kristo, sed disaj, ni estas dolorige konsciaj ke ni ankoraŭ ne kapablis kuniĝi por dispecigi la panon kune. Ni rapidigu la tagon, en kiu ni povos efektivigi la plenecon de la komuneco ĉe la manĝotablo de la Sinjoro.

**Ĉ: Enmetu en nian koron la deziron superi ĉion, kio disigas nin, tiel ke ni povu ekvidi la ununuran Kriston kvankam ankoraŭ disaj.**

C: Irante direkte al la libero, ni memoru, kune kun la *dalita* komunumo, la aliajn personojn kiuj alfrontas similajn diskriminaciojn, kaj la unueco de la eklezioj povu esti signo de espero en la situacioj de maljusteco.

**Ĉ: Plifortigu la sindevigon de niaj eklezioj por la kreo de spacoj en niaj socioj kaj en niaj komunumoj, por ebligi al ili vivon en la digno kaj en la libero. Faru, ke ni povu esti transformataj de iliaj donacoj kaj de ilia ĉeesto.**

C: Irante kiel filoj de la tero, ni konscias ke ni estas pilgrimantoj en ĉi tiu mirinda donaco de la kreado, kiu estis havigita al ni. Ni respektu la teron kiel vian kreitaĵon kaj ni sentivigu nin je ĝia prigardo.

**Ĉ: Faru ke Via Spirito renovigu la kreitaron, kaj igu nin atentaj al la sufero de la homoj ne posedantaj teron, kiuj ofte estas portantoj de tradicioj de saĝa prizorgo de la tero kaj de ĝiaj riĉfontoj.**

C: Irante kiel geamikoj de Jesuo, ni akompanu la komunumojn marĝenigitajn en la tuta mondo, kun kiuj Jesuo elektis identiĝi en la superado de jarcentoj da honto kaj je la serĉo de la libero kaj de la digno. Ni akceptu en la amikeco la geamikojn de Kristo, kiel la *dalitajn* kristanojn, kiuj ofte estas persekutataj pro tio ke ili elektis Kriston kaj forpuŝis la kastojn.

**Ĉ: Pligrandigu kaj pliprofundigu nian komunecon kaj nian amikecon kun vi kaj inter ni, por ke ni restu sincere fidelaj al via alvoko.**

C: Irante trans la barilojn, ni konstruu komunumojn de unueco kaj egaleco.

**Ĉ: Donu al ni la kuraĝon superi la kulturojn kaj la strukturojn, kiuj malebligas al ni rekoni reciproke la ĉeeston de Dio.**

C: Irante en solidareco kun personoj kia Sarah kaj aliaj viktimoj de diskriminacio kaj maljusteco, ni deskuu el ni nian neagemon.

**Ĉ: Ĉirkaŭvolvu nin per Via amo, dum ni asertas la bildon de Dio en ĉiu homo kiun ni renkontas. Igu nin kapablaj praktiki la justecon disrompante la sociajn strukturojn de maljusteco.**

C: Irante kaj celebrante kune, ni ekvidas, ke la unueco kiun ni dividas en niaj komunumoj estas profunda atesto pri la evangelio de fido kaj de espero. Dum ni festas tiun unuecon, ni kune ĝoju pro nia riĉa diverseco, kiu reflektas nian vivon en la Triunuo.

**Ĉ: Ni povu festi la mirindan diversecon en la homa vivo, naskiĝintan el la bataloj por la digno kaj la transvivo meze de la subpremado, kaj legi en ĝi signon de Via konstanta fideleco al Via popolo.**

C: Ni levu ĉiujn niajn preĝojn en la nomo de Kristo.

*Patro Nia*

**Ĉ: Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu via nomo.
Venu via regno.
Fariĝu via volo,
kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Ĉar Via estas la regno,
kaj la potenco
kaj la gloro.
Amen.**

## VI. Beno kaj Forsendo

C: Ho Dio Triunuo kiu nutras nin, montru vin ĉeestanta antaŭ ni por memorigi al ni la planon kiun vi havas por ĉiu el ni kaj por niaj eklezioj.
**Ĉ: Amen.**

C: Ho Dio Triunuo kiu nin plifortigas, iru antaŭ ni, por gvidi nin laŭ la vojo al unueco.
**Ĉ: Amen.**

C: Ho Dio Triunuo kiu nin subtenas, voku nin al la abundo de vivo, nin ĉiujn kiuj kune alkvokas Dion.
**Ĉ: Amen.**

C: Iru en la mondon por alporti sanigon kaj por estis sanigataj.
**Ĉ: Al Dio estu danko.**

*Fina kanto*
Kiel signon de unueco oni sugestas aranĝi modestan kunmanĝon.

**Bibliaj Meditadoj kaj Preĝoj por la Ok Tagoj**

## LA UNUA TAGO: PAŜI EN DIALOGO

**Legaĵoj:**

*Genezo 11,1-9: La historio de Babel kaj la postspuro de nia diverseco*

Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero. Kaj kiam ili ekiris de la oriento, ili trovis valon en la lando Ŝinar kaj tie ekloĝis. Kaj ili diris unu al alia: Venu, ni faru brikojn kaj ni brulpretigu ilin per fajro. Kaj la brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kalko. Kaj ili diris: Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero. Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia. Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon. Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero kaj de tie la Eternulo disigis ilin sur la supraĵon de la tuta tero.

*Psalmo 34,12-19: Venu aŭskulti min! La invito de Dio al la konversacio*

Venu, infanoj, aŭskultu min;
Pri timo antaŭ la Eternulo mi vin instruos.
Kiu ajn vi estas, homo,
Kiu deziras vivon kaj amas multajn kaj bonajn tagojn:
Gardu vian langon kontraŭ malbono,
Kaj vian buŝon kontraŭ mensoga parolo;
Dekliniĝu de malbono kaj faru bonon,
Serĉu pacon kaj ĉasu ĝin.
La okuloj de la Eternulo estas turnitaj al la piuloj,
Kaj Liaj oreloj al iliaj krioj.
La vizaĝo de la Eternulo estas kontraŭ tiuj, kiuj faras malbonon,
Por ekstermi de la tero la memoron pri ili.
Oni krias, kaj la Eternulo aŭdas,
Kaj de ĉiuj iliaj mizeroj Li ilin savas.
Proksima estas la Eternulo al tiuj, kies koro estas rompita,
Kaj la spirite suferantajn Li helpas.

*Agoj 2,1-12: La elverŝado de la Spirito, la dono de la kompreno*

Kaj kiam venis la Pentekosta tago, ili ĉiuj estis unuanime en unu loko. Kaj subite venis el la ĉielo sono kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenigis la tutan domon, kie ili sidis. Kaj al ili aperis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli aliajn lingvojn, kiel la Spirito donis al ili parolpovon. Kaj en Jerusalem tiam loĝis piaj Judoj el ĉiu nacio sub la ĉielo. Kaj kiam aŭdiĝis tiu sono, la homamaso kunvenis kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per lia propra dialekto. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris, dirante unu al alia: Rigardu! ĉu ne estas Galileanoj ĉiuj tiuj parolantoj? Kiel do ni aŭdas ĉiu en sia dialekto, en kiu ni naskiĝis? Partoj kaj Medoj kaj Elamanoj, kaj loĝantoj en Mezopotamio, Judujo, Kapadokio, Ponto kaj Azio, Frigio kaj

Pamfilio, Egiptujo kaj la partoj de Libio apud Kireno, kaj pasloĝantaj Romanoj, Judoj kaj prozelitoj, Kretanoj kaj Araboj – ni aŭdas ilin paroli en niaj lingvoj la mirindaĵojn de Dio. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj embarasiĝis, dirante unu al alia: Kion ĉi tio signifas?

*Luko 24,13-35: konversacio kun Jesuo Resurektinta en la vojo*

Kaj jen du el ili iris en tiu sama tago al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalem sesdek stadiojn. Kaj ili interparolis inter si pri ĉio tio, kio okazis. Kaj dum ili interparolis kaj diskutis inter si, Jesuo mem alproksimiĝis kaj iris kun ili. Sed iliaj okuloj estis malhelpataj tiel, ke ili lin ne rekonis. Kaj li diris al ili: Kiaj vortoj estas tiuj, kiujn vi interŝanĝas, dum vi iras? Kaj ili haltis, kun malgaja mieno. Kaj unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al li: Ĉu nur vi sola loĝas en Jerusalem, kaj ne scias tion, kio tie okazis en ĉi tiuj tagoj? Kaj li diris al ili: Kion? Kaj ili diris al li: Pri Jesuo, la Nazaretano, kiu estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo; kaj kiel la ĉefpastroj kaj niaj regantoj transdonis lin por kondamno al morto, kaj lin krucumis. Sed ni esperis, ke li estas tiu, kiu elaĉetos Izraelon. Kaj plie, krom ĉio tio, hodiaŭ estas jam la tria tago, de kiam tio okazis. Ankaŭ mirigis nin iuj virinoj el inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, kaj ne trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ vidis vizion de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas. Kaj iuj el nia kunularo iris al la tombo, kaj trovis tiel, kiel diris la virinoj; sed lin ili ne vidis. Kaj li diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? Kaj komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem. Kaj ili alproksimiĝis al la vilaĝo, kien ili iris, kaj li ŝajnigis al ili, kvazaŭ li pluen iros. Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas. Kaj li eniris, por resti ĉe ili. Kaj dum li sidis kun ili ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili. Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili. Kaj ili diris unu al alia: Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn? Kaj leviĝinte en tiu sama horo, ili reiris al Jerusalem, kaj trovis la dek unu kunvenintaj, kun siaj kunuloj, kaj dirantaj: La Sinjoro vere leviĝis, kaj aperis al Simon. Kaj ili rakontis tion, kio okazis sur la vojo, kaj kiamaniere li rekoniĝis al ili en la dispecigo de pano.

**Komento**

Humile promeni kun la Sinjoro signifas promeni kun homoj kiuj parolas unuj al la aliaj kaj al la Sinjoro, ĉiam atentaj al tio, kion ili aŭskultas. Pro tio ni komencas nian celebron de la Semajno de Preĝado por la Unuiĝo de la Kristanoj primeditante la tekstojn de la Biblio kiuj parolas pri la esenca praktiko nome konversacio. Nuntempe ĝi estas centra elemento en la ekumena movado, ĉar ĝi malfermas pordojn por ke unuj lernu de aliaj, por dividi tion, kion ni havas komune kaj por ke niaj malsamecoj estu aŭskultitaj kaj akceptitaj. Tiel, reciproka kompreno disvolviĝas. Tiuj donoj en la serĉo pri la unuiĝo estas partoj de nia baza alvokiĝo por respondi al tio, kion Dio postulas de ni: per vera konvertiĝo, la justeco fariĝas kaj la boneco estas lernata. Praktikaj spertoj de liberiĝo tra la mondo klarigas, ke la izoliĝo de homoj devigataj vivi malriĉe estas energie transpasebla per dialogaj praktikoj.

La hodiaŭa legaĵo el Genezo kaj la historio de Pentekosto montras ion pri tiu homa agado kaj ties loko en la liberiga plano, kiun Dio havas por sia popolo. La historio de la Turo de Babelo unue rakontas, kiel grandaj aferoj estas fareblaj kiam ne ekzistas lingvaj muroj. Tamen, la historio montras, ke tiu kapablo estas komprenata kiel bazo por la sinpromocio: „Ni akiru al ni gloron“ estas la motivo por la konstruado de tiu granda verko. Fine, tiu projekto kondukas al lingvokonfuzo; de tiam, ni bezonas lerni la signifon de nia propra humaneco per pacienca atento dediĉata al la alia, kiu estas fremdulo al ni. Nur per la elverŝado de la Sankta Spirito la interkompreniĝo ene de malsamecoj fariĝas ebla en nova maniero, per la potenco de la

resurekto de Jesuo. Nun ni estas invitataj interŝanĝi la donacon nome paroli kaj aŭskulti, donaco direktita al la Sinjoro kaj al la libereco. Ni estas invitataj promeni en la Spirito.

La sperto de la disĉiploj en la vojo de Emaus estas konversacio kiu okazas en la kunteksto de grupa vojaĝo, sed ankaŭ de perdo kaj malĝojiĝo rilate al la espero. Konsiderante la Eklezioj en pluraj niveloj de malunuiĝo kaj la societoj dividitaj de antaŭjuĝoj kaj timo je la alia, ni povas rekoni nin en tiu sperto. Tamen, ĝuste tie Jesuo decidas enmiksiĝi en la konversacio - ne en la supera rolo de instruisto, sed promenante apud la disĉiploj. Lia deziro aparteni al niaj konversacioj kaj nia respondo dum ni volas ke li restu kaj parolu plu kun ni estas la iloj, kiuj ebligas al ni vivan renkontiĝon kun la Resurektinta Sinjoro.

Ĉiuj kristanoj scias ion pri tiu renkontiĝo kun Jesuo kaj pri la potenco de lia vorto „brulanta en ni"; tiu sperto pri la resurekto alvokas nin al pli profunda unuiĝo je Kristo. La konstanta konversacio, inter ni kaj kun Jesuo - eĉ ene de nia propra manko je direkto - konservas nin en la vojo, kune al la unueco.

**Preĝo**

Jesuo Kristo, ni proklamas ĝoje nian komunan identecon en Vi, kaj ni Vin dankas ĉar Vi invitis nin al ama dialogo kun Vi. Malfermu niajn korojn por ke ili partoprenu pli perfekte en via preĝo al la Patro por ke ni estu unu, tiel, ke, promenante kune, ni ĉiam kapablu proksimiĝi pli kaj pli al la aliaj. Donu al ni la kuraĝon kune atesti pri la vero kaj, ke nia dialogo enmiksigu eĉ tiujn, kiuj eternigas la malunuiĝon. Sendu vian Spiriton por kapabligi nin alfronti la defiantajn situaciojn, kiuj okazas en niaj societoj, landoj kaj en la mondo, kaj en kiuj la digneco kaj la kompato malĉeestas. Dio de la vivo, konduku nin al la justeco kaj al la paco. Amen.

**Demandoj por persona pripenso**

Kie, ene de la pluraj diferencoj kiuj disigas nin, ni praktikas veran konversacion?

Ĉu nia konversacio estas direktita al iu granda projekto de nia propra intereso aŭ al la nova vivo kiu alportas la esperon pri la resurekto?

Kun kiuj homoj ni konversacias kaj kiu ne estas inkludita en niaj konversacioj? Kial?

**LA DUA TAGO: PAŜI KIEL KORPO DE KRISTO**

**Legaĵoj**

*Jeĥezkel 37,1-14: „Ĉu reviviĝos ĉi tiuj ostoj?“*

Aperis super mi la mano de la Eternulo, kaj elirigis min en la inspiro de la Eternulo, kaj starigis min meze de ebenaĵo, kiu estis plena de ostoj. Kaj Li kondukis min ĉirkaŭe ĉirkaŭ ili; estis tre multe da ili sur la ebenaĵo, kaj ili estis tre sekaj. Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo! ĉu reviviĝos ĉi tiuj ostoj? Mi respondis: Ho Sinjoro, ho Eternulo, nur Vi tion scias. Kaj Li diris al mi: Profetu pri ĉi tiuj ostoj, kaj diru al ili: Ho sekaj ostoj, aŭskultu la vorton de la Eternulo! Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, al ĉi tiuj ostoj: Jen Mi venigos en vin spiriton, kaj vi reviviĝos; kaj Mi donos al vi tendenojn, Mi kreskigos ĉirkaŭ vi karnon, Mi kovros vin per haŭto, Mi enmetos en vin spiriton, kaj vi reviviĝos; kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. Kaj mi profetis, kiel estis ordonite al mi; kaj kiam mi eldiris mian profetaĵon, fariĝis bruo kaj tumulto, kaj la ostoj komencis alproksimiĝadi, ĉiu osto al sia osto. Kaj mi vidis: jen sur ili estas tendenoj, kaj elkreskis karno, kaj haŭto kovris ilin supre; sed spirito en ili ne estis. Kaj Li diris al mi: Profetu al la spirito, profetu, ho filo de homo, kaj diru al la spirito: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: El la kvar ventoj venu, ho spirito, kaj ekblovu sur ĉi tiujn mortigitojn, por ke ili reviviĝu. Kaj mi profetis, kiel Li ordonis al mi; kaj eniris en ilin spirito, kaj ili reviviĝis kaj stariĝis sur siaj piedoj, tre, tre granda armeo. Kaj Li diris al mi: Ho filo de homo! ĉi tiuj ostoj estas la tuta domo de Izrael. Jen ili diras: Sekiĝis niaj ostoj, kaj pereis nia espero, decidita estas nia sorto. Tial profetu, kaj diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi malfermos viajn tombojn kaj eligos vin el viaj tomboj, ho Mia popolo, kaj Mi venigos vin en la landon de Izrael. Kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi malfermos viajn tombojn kaj eligos vin el viaj tomboj, ho Mia popolo. Kaj Mi enmetos Mian spiriton en vin, kaj vi reviviĝos, kaj Mi aranĝos vin en via lando; kaj vi ekscios, ke Mi, la Eternulo, tion parolis kaj faris, diras la Eternulo.

*Psalmo 22 (21),1-9: La servisto de Dio, primokata kaj insultata krias al Dio*

Mia Dio, mia Dio, kial vi forlasis min,
Kaj estas malproksima de mia savo, de miaj plendaj paroloj?
Mia Dio, mi vokas en la tago, kaj Vi ne respondas;
En la nokto, kaj mi ne trovas trankvilon.
Sed Vi estas sankta,
Ho Vi, kiu loĝas inter la glorado de Izrael.
Vin fidis niaj patroj;
Ili fidis, kaj Vi ilin helpis.
Al Vi ili kriadis kaj estis savataj;
Vin ili fidis, kaj ili ne devis honti. –
Sed mi estas vermo kaj ne homo;
Mokata de la homoj, malestimata de la popolo.
Ĉiuj, kiuj min vidas, insultas min,
Malfermegas la buŝon, balancas la kapon, dirante:
Li apogis sin al la Eternulo: Tiu helpu lin;
Tiu savu lin, se Li amas lin.

*Hebreoj 13,12-16: La alvoko iri renkonten al Jesuo „ekster la tendaro”*

Tial Jesuo ankaŭ, por ke li sanktigu la popolon per sia propra sango, ekster la pordego suferis. Tial ni eliru al li ekster la tendaro, portante lian riproĉon. Ĉar ĉi tie ni ne havas restantan

urbon, sed estontan ni serĉas. Per li do ni oferu al Dio ĉiam oferon de laŭdo, tio estas, la frukton de niaj lipoj konfesantaj al lia nomo. Sed ne forgesu la bonfaradon kaj kunulecon; ĉar tiaj oferoj plaĉas al Dio.

*Luko 22,14-23: Jesuo rompas la panon, donacante sin mem antaŭ sia pasiono*

Kaj kiam alvenis la horo, li sidiĝis, kaj la apostoloj kun li. Kaj li diris al ili: Kun deziro mi deziris manĝi ĉi tiun Paskon kun vi, antaŭ ol mi suferos; ĉar mi diras al vi: Mi ne manĝos ĝin, antaŭ ol ĝi plenumiĝos en la regno de Dio. Kaj ricevinte kalikon, kaj doninte dankon, li diris: Ĉi tion prenu kaj dividu inter vi; ĉar mi diras al vi: De nun mi ne trinkos el la frukto de la vinberarbo, ĝis venos la regno de Dio. Kaj li prenis panon, kaj doninte dankon, li ĝin dispecigis kaj donis al ili, dirante: Ĉi tio estas mia korpo, kiu estas donita por vi; ĉi tion faru por memorigo pri mi. Sammaniere ankaŭ la kalikon post la vespermanĝo, dirante: Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en mia sango, kiu estas elverŝata por vi. Sed jen la mano de tiu, kiu min perfidas, estas apud mi sur la tablo. Ĉar la Filo de homo ja iros, laŭ la antaŭdecido; sed ve al tiu viro, de kiu li estos perfidata! Kaj ili komencis diskuti inter si: kiu el ili faros tion.

**Komento**

Iri kun Dio signifas aŭdi la vokon kiu elvokas nin el nia hejmo al la flanko de la proksimulo precipe al tiu kiu suferas.
„Sekiĝis niaj ostoj, kaj pereis nia espero, decidita estas nia sorto". Tiuj vortoj de la profeto Jeĥezkel esprimas ankaŭ hodiaŭ la spertojn de multaj homoj, ĉie en la mondo. En Hindio, la "rompita popolo" de la pariaj komunumoj evidentigas tian suferon kiun la krucumita Jesuo partoprenas. Kune kun la suferantoj ĉie kaj ĉiam Jesuo laŭte vokas al la Patro: „Mia Dio, mia Dio, kial vi forlasis min?"

La kristanoj estas vokataj sur la vojon de la kruco. La Epistolo al la Hebreoj instruas nin ke la sufero de Jesuo estas suferi kun la malestimatoj. Li vokas nin „eliri ekster la pordegon" por renkonti lin tie. Kiam ni renkontas malestimatajn personojn kiel la *Dalitoj,* kaj kiam ni ekkonas en liaj suferoj la krucumitan Jesuon, tiam ni scias kie ni iru: Iri kun Kristo signifas esti solidaraj kun tiuj, kiuj estas marĝenigitaj, kies vundojn li dividas.

La korpo de Kristo estis „rompita por vi" sur la kruco. En la komenco de la Pasiono Jesuo celebris la Lastan Vespermanĝon. Ĉiam kiam ni celebras tiun Vespermanĝon, ni solenas la venkon super la morto. La disŝirita korpo de Kristo estas samtempe la glorigita korpo de la Resurektinto. Lia korpo estis rompita por ke ni povu partopreni lian vivon kaj esti unu korpo en Li.

Por ni, kristanoj sur la vojo al unuiĝo, la eŭkaristio povas ofte aperi kiel la loko, kie la skandalo de nia malunuiĝo malĝojige evidentiĝas, ĉar ni ja scias, ke nun ni ankoraŭ ne povas kune ricevi tiun sakramenton, kiel ni devus. Tiu situacio instigas nin renovigi niajn strebojn al pli profunda komuneco inter ni.

La bibliaj tekstoj de hodiaŭ montras al ni ankoraŭ alian aspekton de la kunuleco: Esti survoje kun la rompita korpo de Kristo signifas kundividi nian panon kun la malsatantoj kaj rompi la katenojn de mizero kaj ne-egaleco. Tiuj estas same „eŭkaristiaj agoj". Ĉiuj kristanoj partoprenu tiun kunulecon. Papo Benedikto 16a diris pri la eŭkaristio: „Tio estas sakramento ne nur por kredi kaj celebri, sed ankaŭ por vivi" (Sacramentum Caritatis, 71).

**Preĝo**

Mizerikorda Dio, via Filo mortis sur la kruco, por ke, en lia disŝirita korpo, niaj dividoj povu esti detruitaj. Ni ĉiam kaj ĉiam krucumis lin pro nia malunueco. Ni kontinuis maljustajn strukturojn, sistemojn kaj agojn. Ni agis kontraŭ via justeco por la malestimatoj, kaj ni malebligis vian zorgemon por la malriĉuloj. Sendu al ni vian Spiriton kiu sanigas nian malunuecon, por ke ni kune atestu la justecon kaj amon de Kristo. Akompanu niajn paŝojn ĝis la la tago, kiam ni povos dividi unu solan panon kaj unu solan pokalon ĉe la sama tablo.Vi, kiu estas la Dio de la vivo, konduku nin al  la justeco kaj paco. Amen

**Demandoj por persona pripenso**

Ĉe la lumo de la profeta tradicio, laŭ kiu Dio volas la praktikon de la justeco pli ol senjustecajn ritojn, ni devas nin demandi : kiel oni celebras la eŭkaristion - la misteron de la rompiteco kaj  de la nova vivo de Kristo - en ĉiuj lokoj, kie ni vojiras?

Kion ni povus kune fari, kiel  kristanoj, por doni pli gravan ateston pri nia unueco kun Kristo tie, kie vivas la rompitoj kaj malakceptitoj?

## LA TRIA TAGO: PAŜI AL LA LIBERO

### Legaĵoj

*Eliro 1,15-22:* La Hebreaj akuŝistinoj obeas al Dio, ne al la ordono de Faraono

Kaj la reĝo de Egiptujo parolis al la Hebreaj akuŝistinoj, el kiuj unu estis nomata Ŝifra kaj la dua estis nomata Pua. Li diris: Kiam vi akuŝigos la Hebreinojn, rigardu la kuŝejon; se estas filo, mortigu lin, kaj se estas filino, lasu ŝin vivi. Sed la akuŝistinoj timis Dion, kaj ili ne faris, kiel diris al ili la reĝo de Egiptujo; kaj ili lasis la vivon al la virseksaj infanoj. Kaj la reĝo de Egiptujo alvokis la akuŝistinojn, kaj diris al ili: Kial vi tion faras kaj lasas la vivon al la virseksaj infanoj? Tiam la akuŝistinoj diris al Faraono: Ne kiel la Egiptaj virinoj estas la Hebreinoj; ili estas viglaj: antaŭ ol venas al ili la akuŝistino, ili jam estas naskintaj. Kaj Dio faris bonon al la akuŝistinoj, kaj la popolo multiĝis kaj tre fortiĝis. Kaj ĉar la akuŝistinoj timis Dion, Li konstruis al ili domojn. Kaj Faraono ordonis al sia tuta popolo, dirante: Ĉiun filon, kiu naskiĝis, ĵetu en la Riveron, kaj ĉiun filinon lasu viva.

*Psalmo 17 (16),1-6: La fidema preĝo de tiu, kiu estas malfermita al la rigardo de Dio*

Aŭskultu, ho Eternulo, la justulon, atentu mian krion,
Donu orelon al mia preĝo el ne malsincera buŝo.
De Vi venos mia juĝo;
Viaj okuloj rigardos la veremecon.
Vi esploras mian koron, ekzamenas ĝin en la nokto; Vi elprovas min,
Kaj Vi trovas nenion, kion mi intencus,
Sed kio ne volus eliri el mia buŝo.
Pri homaj faroj, konforme al la vortoj el Via buŝo,
Mi gardis min de vojoj kontraŭleĝaj.
Miaj paŝoj tuj sekvas en Viaj postesignoj,
Miaj piedoj ne ŝanceliĝas. –
Mi vokas al Vi, ĉar Vi respondos al mi, ho Dio;
Klinu al mi Vian orelon kaj aŭdu mian parolon.

*2 Korintanoj 3,17-18: La libereco de la filoj de Dio en la gloro*

La Sinjoro estas la Spirito; kaj kie estas la Spirito de la Sinjoro, tie estas libereco. Sed ni ĉiuj, per nevualita vizaĝo spegulante la gloron de la Sinjoro, transformiĝas en la saman bildon, de gloro al gloro, kiel el la Sinjoro la Spirito.

*Johano 4,4-26: La interparolo kun Jesuo kondukas la samarianinon al vivo pli libera*

Kaj li devis trairi tra Samario. Li alvenis do al unu urbo Samaria, nomata Siĥar, apud la terpeco, kiun Jakob donis al sia filo Jozef; kaj la fonto de Jakob estis tie. Jesuo do, lacigita de sia vojirado, sidiĝis tiamaniere apud la fonto. Estis ĉirkaŭ la sesa horo. Venis virino Samaria, por ĉerpi akvon; Jesuo diris al ŝi: Donu al mi trinki. Ĉar liaj disĉiploj jam foriris en la urbon, por aĉeti nutraĵojn. La Samarianino do diris al li: Kiel vi, estante Judo, petas trinki de mi, kiu estas Samarianino? (Ĉar la Judoj ne interrilatas kun la Samarianoj.) Jesuo respondis kaj diris al ŝi: Se vi scius la donacon de Dio, kaj kiu estas tiu, kiu diras al vi: Donu al mi trinki, vi petus lin, kaj li donus al vi vivan akvon. La virino diris al li: Sinjoro, vi nenian ĉerpilon havas, kaj la puto estas profunda; de kie do vi havas tiun vivan akvon? Ĉu vi estas pli granda ol nia patro Jakob, kiu donis al ni la puton, kaj trinkis mem el ĝi, kiel ankaŭ liaj filoj kaj liaj brutoj?

Jesuo respondis kaj diris al ŝi: Ĉiu, kiu trinkas el ĉi tiu akvo, denove soifos; sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo. La virino diris al li: Sinjoro, donu al mi ĉi tiun akvon, por ke mi ne plu soifu, kaj ne devu traveni ĉi tien, por ĉerpi. Jesuo diris al ŝi: Foriru, voku vian edzon, kaj revenu ĉi tien. La virino respondis kaj diris al li: Mi ne havas edzon. Jesuo diris al ŝi: Vi prave diris: Mi ne havas edzon; ĉar vi havis kvin edzojn; kaj tiu, kiun vi nun havas, ne estas via edzo; ĉi tion vi diris vere. La virino diris al li: Sinjoro, mi ekvidas, ke vi estas profeto. Niaj patroj adoradis sur ĉi tiu monto; kaj vi diras, ke en Jerusalem estas la loko, kie oni devas adori. Jesuo diris al ŝi: Kredu al mi, virino; venas la horo, kiam nek sur ĉi tiu monto, nek en Jerusalem, vi adoros la Patron. Vi adoras tion, kion vi ne konas; ni adoras tion, kion ni konas; ĉar el la Judoj estas la savo. Sed venas la horo, kaj jam estas, kiam la veraj adorantoj adoros la Patron laŭ spirito kaj vero; ĉar la Patro serĉas tiajn por esti Liaj adorantoj. Dio estas Spirito: kaj Liaj adorantoj devas adori Lin laŭ spirito kaj vero. La virino diris al li: Mi scias, ke venas la Mesio (kiu estas nomata Kristo); kiam tiu alestos, li anoncos al ni ĉion. Jesuo diris al ŝi: Tiu estas mi, kiu parolas kun vi.

**Komento**

Paŝi humile kun la Sinjoro ĉiam estas irvojo de akcepto de la libereco proponata al ĉiuj homoj. Ni rememoru pri tio dum tiu ĉi celebrado. Ni celebras la misteron de la luktado por la libereco, okazanta ankaŭ kie la subpremo, la antaŭjuĝo kaj la malriĉeco ŝajnas esti netolereblaj ŝarĝoj. La rezoluta neo akcepti la ordonojn kaj malhomajn kondiĉojn – kiel tiuj ordonitaj de Faraono al la akuŝistinoj de la Hebrea sklava popolo – ŝajnas malgrandaj agoj; sed tiaj ofte estas la agadoj por antaŭenigi la liberecon ĉe lokaj komunumoj ĉie ajn.

Tial ni celebras la determinon je la libereco – en digno, en socia inkluziveco, kaj en justa kundivido de ĉiuj havaĵoj – kiel ĝi estas videbla en *dalitaj* komunumoj. Tiu ĉi paŝado al la pleneco de vivo proponas al ni ĉiuj, enkaptitaj en malegalecaj modeloj, ĉie en la tero, la donacon de la espero pere de la evangelio.

La irvojon, paŝo post paŝo al la libereco el maljusta diskriminacio kaj el antaŭjuĝaj agadoj, oni bone komprenas pere de la historio de la renkontiĝo de Jesuo kun la samarianino ĉe la puto. Virino klopodanta pridiskuti la antaŭjuĝojn pri ŝi kaj trovi la manieron malplipezigi la ŝarĝojn el sia vivo. Tiu j ĉi maltrankvilecoj estas la komenco de la interparolo kun Jesuo. Jesuo interparolas kun ŝi kaj por peti helpon kaj elimini la sociajn antaŭjuĝojn, kiuj malebligas la helpon. Iom post iom fronte al ŝi malfermiĝas la vojo al pli libera vivo, laŭvice la malsimpleco de ŝia vivo estas observata je la lumo de la vortoj de Jesuo. Je la fino de la interparolo, la temo estas la adormaniero de la du grupoj, la judoj kaj la samarianoj – pri la ejo kie ili devus adori – ĝi estas transcendita. Adori „laŭ la Spirito kaj la vero de Dio“, tion asertas Jesuo. Tiel ni lernas esti liberigataj de la ligilo de la vivo kune kaj plene vivi.

Esti vokataj al pli vasta libereco en Kristo, estas alvoko al pli intensa komuneco. Tio kio dividas nin – kaj kiel kristanoj serĉantaj unuecon, kaj kiel popoloj disigataj pro maljustaj tradicioj kaj malegalecoj – igas nin malliberuloj, kaj nekonataj reciproke. Kontraŭe nia libereco en Kristo estas karakterizata de la nova vivo en la Spirito, kiu igas nin kapablaj resti kune fronte al la gloro de Dio „kun nekovrita vizaĝo”; en tiu ĉi glora Lumo ni lernas rigardi nin unu la alian pli sincere, dum ni kreskas pere de Kristo al la plena kristana unueco.

**Preĝo**

Ho Dio liberiganto, ni dankas vin pro la kuraĝo kaj la espero de la kredo de tiuj, kiuj luktas por havi plenan kaj dignan vivon. Ni scias ke vi restarigas la falintojn kaj liberigas la malliberulojn. Via filo Jesuo iras kun ni por montri al ni la vojon al la vera libereco. Ebligu ke

ni povu aprezi tion, kion vi donas al ni, fortikigu nin por kontraŭstari ĉion, kio malliberigas nin ene. Sendu vian Spiriton por ke la vero igu nin liberaj, kaj tiel ni povu proklami unanime vian Amon al la mondo. Dio de la vivo, konduku nin al la justeco kaj al la paco. Amen

**Demandoj por persona pripenso**

Ĉu en niaj kristanaj komunumoj, estas momentoj en kiuj la antaŭjuĝoj kaj la juĝoj pri la mondo – pri kasto, aĝo, genro, raso, nivelo de edukado – malhelpas nin rigardi unu la alian klare je la Lumo de la gloro de Dio?

Kiajn konkretajn malgrandajn paŝojn ni povas fari kune kiel kristanoj al la libereco de idoj de Dio (vidu Rom 8,21) por niaj eklezioj kaj por la tuta homaro?

## LA KVARA TAGO: PAŜI KIEL FILOJ DE LA TERO

### Legaĵoj

*Levidoj 25,8-19: La tero estas por la komuna bono, ne por la persona profito*

Kaj kalkulu al vi sep sabatajn jarojn, sep fojojn po sep jaroj, ke vi havu en la sep sabataj jaroj kvardek naŭ jarojn. Kaj proklamu per trumpetado en la sepa monato, en la deka tago de la monato; en la tago de pekliberigo trumpetu en via tuta lando. Kaj sanktigu la kvindekan jaron, kaj proklamu liberecon en la lando por ĉiuj ĝiaj loĝantoj: jubileo ĝi estu por vi; kaj revenu ĉiu al sia posedaĵo, kaj ĉiu revenu al sia familio. Jubileo ĝi estu por vi, la kvindeka jaro; ne semu, kaj ne rikoltu tion, kio mem elkreskis, kaj ne deprenu la berojn de la nepritranĉitaj vinberbranĉoj. Ĉar jubileo ĝi estas, sankta ĝi estu por vi; de la kampo manĝu ĝiajn produktaĵojn. En tiu jubilea jaro ĉiu revenu al sia posedaĵo. Kaj se vi ion vendos al via proksimulo, aŭ se vi aĉetos el la manoj de via proksimulo, unu ne malprofitigu la alian. Laŭ la kalkulo de la jaroj post la jubileo aĉetu de via proksimulo; laŭ la kalkulo de la jaroj de produktado li vendu al vi. Laŭ la multeco de la jaroj pligrandigu la prezon, kaj ju pli malmultaj estas la jaroj, des pli malgrandigu la prezon; ĉar la nombron de la rikoltoj li vendas al vi. Kaj ne malprofitigu unu la alian, kaj timu vian Dion; ĉar Mi estas la Eternulo, via Dio. Kaj plenumu Miajn leĝojn, kaj Miajn decidojn observu kaj plenumu ilin, kaj tiam vi loĝos en la lando sendanĝere. Kaj la tero donados siajn fruktojn, kaj vi manĝados ĝissate, kaj vi loĝos sur ĝi sendanĝere.

*Psalmo 65 (64),6b-14: La abunda elverŝo de la graco de Dio sur la teron*

Vi respondas al ni en justeco,
Ho Dio de nia savo,
Espero de ĉiuj finoj de la tero kaj de malproksimaj maroj,
Vi, kiu fortigas montojn per Sia forto,
Kiu estas zonita per potenco,
Kiu kvietigas la bruadon de maroj, la bruadon de iliaj ondoj,
Kaj la tumulton de popoloj.
Kaj ektimos pro Viaj mirakloj la loĝantoj de la limoj;
La lokojn de la sunleviĝo kaj sunsubiro Vi ĝojigas. –
Vi memoras pri la tero,
Kaj Vi donas al ĝi akvon, kaj Vi forte ĝin riĉigas;
La torento de Dio estas plena de akvo;
Vi pretigas ĝian panon, ĉar tiel Vi ĝin aranĝis.
Vi donas trinkon al ĝiaj sulkoj,
Vi ebenigas ĝiajn bulojn;
Per pluvego Vi ĝin moligas,
Vi benas ĝiajn kreskaĵojn.
Vi kronas la jaron per Via bono;
Kaj la signoj de Viaj piedoj gutas per graso.
La stepoj de dezerto grasiĝas,
Kaj la montetoj zoniĝas per ĝojo.
La herbejoj kovriĝas per brutaroj,
Kaj la kampoj vestiĝas per greno;
Ili ĝojas kaj kantas.

*Romanoj 8,18-25: La sopiro al elaĉeto de la tuta kreitaro*

Ĉar mi kalkulas, ke la suferoj de la nuna tempo ne indas komparon kun la gloro, kiu estas malkaŝota al ni. Ĉar la fervora sopiro de la kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio. Ĉar la kreitaro subiĝis sub la vanecon, ne volonte, sed, pro la subiganto, kun espero, ke la kreitaro mem ankaŭ liberiĝos el la sklaveco de pereo en la liberecon de la gloro de la idoj de Dio. Ĉar ni scias, ke la tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras ĝis nun. Kaj krom tio, ni mem, kiuj havas la unuaaĵon de la Spirito, ĝemas en ni, atendante nian adopton, nome la elaĉeton de nia korpo. Ĉar per espero ni estas savitaj; sed la espero, kiu estas vidata, ne estas espero; ĉar kiu esperas al tio, kion li vidas? Sed, se ni esperas al tio, kion ni ne vidas, tiam ni ĝin atendas pacience.

*Johano 9,1-11: Jesuo sanigas: koto, korpo kaj akvo*

Kaj preterirante, li vidis viron blindan de post la naskiĝo. Kaj liaj disĉiploj demandis lin, dirante: Rabeno, kiu do pekis, ĉi tiu viro, aŭ liaj gepatroj, ke li naskiĝis blinda? Jesuo respondis: Nek ĉi tiu viro pekis, nek liaj gepatroj; sed por ke la faroj de Dio aperu en li. Dum estas tago, mi devas prilabori la farojn de Tiu, kiu min sendis; venas la nokto, kiam neniu povas labori. Dum mi estas en la mondo, mi estas la lumo de la mondo. Dirinte tion, li kraĉis sur la teron, kaj faris el la kraĉaĵo koton, kaj ŝmiris per la koto la okulojn de la blindulo, kaj diris al li: Iru, lavu vin en la lageto de Ŝiloaĥ (tio estas, Sendito). Li do foriris, kaj sin lavis, kaj revenis vidanta. La najbaroj do, kaj tiuj, kiuj antaŭe vidis lin, ke li estas almozulo, diris: Ĉu ĉi tiu ne estas tiu, kiu sidis kaj petis almozojn? Unuj diris: Li estas; aliaj diris: Ne, sed li estas simila al tiu. Li diris: Tiu mi estas. Ili do diris al li: Kiamaniere viaj okuloj malfermiĝis? Li respondis kaj diris: La homo, nomata Jesuo, faris koton kaj ŝmiris miajn okulojn, kaj diris al mi: Iru al Ŝiloaĥ, kaj vin lavu; kaj mi iris, kaj lavis min, kaj mi ricevis vidpovon.

**Komento**

Se ni devas marŝi humilece kun Dio, ni devus ĉiam konscii pri nia memo kiel parto el la Kreo kaj ricevintoj de donacoj de Dio. Ĥodiaŭ leviĝas kreskanta rekono ke pli bona interkompreniĝo pri nia situo en la Kreo devas fariĝi prioritato. Precipe kristanoj pli multe konsciiĝas pri la fakto ke atentemo al kreitaro estas parto el „marŝado humilece kun Dio“, la Kreinto, ĉar ĉion, kion ni havas, Dio donis al ni per sia kreado, kaj sekve tio ĉi ne estas tiom „nia“ ke ni eluzu ĝin laŭ nia plaĉo. Estas pro tio ke, de la 1a de septembro ĝis la 4a de oktobro, kristanoj estas invitataj plenumi iajn „Tagoj por gardo de Kreitaĵo“ – praktikado ĉiam pli disvastiĝanta ĉe multaj preĝejoj. En 1989, ekumena Patriarko Dimitrios la 1a proklamis la 1an de septembro „preĝa tago por la Kreitaro“. La liturgia kalendaro de la Ortodoksaj Konfesioj komenciĝas tiutage per memorigo de la monda kreado fare de Dio. La 4an de oktobro, multaj preĝejoj el okcidenta tradicio celebras Franciskon el Asizo, aŭtoron de la Kanto de Kreitaĵoj. La komenco kaj konkludo de la „Tagoj por gardo de Kreitaĵo“ estas pro tio ligitaj al atentemo pri Kreitaro respektive en la orienta kaj okcidenta tradicioj de kristanismo.

La kristana historio estas historio pri elaĉeto por la tuta Kreo; ĝi estas ties historio mem. La kredo ke, en Jesuo, Dio fariĝas homa estaĵo, en specifaj loko kaj tempo, estas ero el fido pri kiu ĉiuj kristanoj kunsentas. Estas kredo komuna pri Enkarniĝo, kiu postulas profundan rekonon pri la graveco de Kreo – de korpoj, de manĝaĵo, de tero, de akvo kaj de ĉio kio nutras la vivon de ni kiel loĝantoj en tiu ĉi planedo. Jesuo estas esenca parto de tiu ĉi mondo. Povas eĉ ŝoki aŭdi kiel Jesuo sanigas uzante salivon kaj teran koton, sed tiu ĉi signifo pri la kreita mondo veras kiel precipa parto de la nova vivo kiun Dio donas al ni. En la mondo, la grundon ofte prilaboras la plej malriĉaj personoj kiuj ĝenerale ne rikoltas la fruktojn, tiu ĉi estas la vivosperto de multaj *Dalitoj* en Hindio. Samtempe, ĝuste la *Dalit*-komunumoj estas tiuj kiuj

speciale priatentas la grundon, ĉar la praktika saĝo en ties prilaborado akompanas ilian penadon.

Prizorgado de grundo postulas respondon al demandoj pri manieroj vivadi en la kreitaro fare de homaro, manieroj kiu estu plene homaj por ĉiuj. La fakto ke la grundo - ĉu por ties prilaboranto, ĉu por ties posedanto – ofte fariĝas fonto de ekonomiaj malegalecoj kaj de labormetodoj humiligaj kaj maldignaj, estas kialo de tre serioza zorgado por kristanoj kaj por komuna agado.

La rekono de kontrakto pri riskoj en ekspluatado de la grundo estas menciita en la instrukcioj entenitaj en iu teksto de Levido pri la jubilea jaro: la grundo kaj ĝiaj fruktoj ne estas donitaj kiel okazo „por avantaĝi sin kontraŭ la aliaj“, sed kontraŭe la grund-prilaborado devas doni avantaĝojn al ĉiuj. Tiu ĉi ne estas simple „religia ideo“, sed ĝi estas strikte kunligita al la realaj ekonomiaj kondiĉoj kaj de entreprenemo rilate al metodo administri, aĉeti kaj vendi grundon.

**Preĝo**

Dio de la vivo, ni dankas vin por la grundo, kaj por tiuj kiuj prizorgas ĝin kaj de tio ricevas fruktojn. Faru ke Via Spirito, vivdonanto, helpu nin konsciiĝi, ke ni estas parto en la interrilatoj de la Kreitaro. Faru ke ni lernu ame konsideri grundon kaj aŭskulti la krean ĝemon.
Faru ke ni povu vere kunpaŝi laŭ la spuroj de Jesuo, resanigante ĉiajn ter-vundojn, certigante justan kundividon de tio kion ĝi produktas. Dio de la vivo, gvidu nin laŭ justeco kaj paco. Amen.

**Demandoj por persona pripenso**

La hodiaŭa teksto legita invitas kristanojn al pli granda unueca agado en komuna prizorgado de la Tero. En kiaj situacioj ni finpretigas la spiriton de la jubilea jaro en nia komuna kristana vivo?

En kiaj cirkonstancoj, en niaj kristanaj komunumoj, ni fariĝas kunkulpuloj en situacioj de defalo kaj ekspluatado de la grundo?

Sur kiaj bazoj ni povas kunlabori pli multe cele al lernado kaj instruado de respekto por la Dia Kreitaro?

## LA KVINA TAGO: PAŜI KIEL AMIKOJ DE JESUO

### Legaĵoj

*Alta Kanto 1,5-8: Amo kaj amato*

Mi estas nigra, tamen beleta,
Ho filinoj de Jerusalem,
Kiel la tendoj de Kedar,
Kiel la tapetoj de Salomono.
Ne rigardu min, ke mi estas nigreta:
La suno min brulkolorigis.
La filoj de mia patrino koleris kontraŭ mi;
Ili faris min gardistino de la vinberĝardenoj;
Mian propran vinberĝardenon mi ne gardis.
Diru al mi, ho vi, kiun mia animo amas,
Kie vi paŝtas, kie vi ripozigas vian brutaron tagmeze:
Kial mi similu al vagistino
Ĉe la brutaroj de viaj kamaradoj?
Se vi ne scias tion, ho belulino inter virinoj,
Sekvu la paŝojn de la ŝafaro,
Kaj paŝtu viajn kapridojn ĉe la tendoj de la paŝtistoj.

*Psalmo 139 (138),1-6: Vi min esploras kaj min konas*

Al la ĥorestro. Psalmo de David.
Ho Eternulo, Vi min esploras kaj min konas.
Vi scias, kiam mi sidas kaj kiam mi leviĝas;
Vi komprenas mian penson de malproksime.
Kiam mi iras kaj kiam mi ripozas, Vi estas ĉirkaŭ mi,
Kaj ĉiujn miajn vojojn Vi konas.
Ĉar antaŭ ol troviĝas vorto sur mia lango,
Jen, ho Eternulo, Vi ĉion jam scias.
De malantaŭe kaj de antaŭe Vi ĉirkaŭbaris min
Kaj metis sur min Vian manon.
Mirinda estas por mi tia sciado, tro alta;
Mi ĝin ne povas kompreni.

*3 Johano,2-8: Akceptemo al la geamikoj en Kristo*

Amato, mi preĝas, ke al vi prosperu ĉio, kaj vi bonsanu tiel same, kiel prosperas al via animo. Ĉar mi treege ĝojis, kiam fratoj venis kaj atestis pri via vereco, kiel vi iradas en la vero. Pli grandan ĝojon mi ne havas, ol aŭdi pri miaj infanoj iradantaj en la vero. Amato, vi faras fidele rilate al ĉiuj viaj klopodoj por la fratoj kaj tiuj fremduloj, kiuj atestis vian amon antaŭ la eklezio; kaj vi faros bone, tiujn antaŭenigante dece je Dio, ĉar pro la Nomo ili eliris, akceptante nenion de la nacianoj. Ni devas do akcepti tiajn, por ke ni estu kunlaborantoj kun la vero.

*Johano 15,12-17: Mi nomas vin amikoj*

Jen estas mia ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amis. Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion mi ordonas al vi, por ke vi amu unu la alian.

**Komento**

Iri humile kun Dio ne signifas iri tutsole. Ĝi signifas iri kun tiuj, kiuj estas vivaj signoj de la ĉeesto de Dio, niaj geamikoj. „Mi nomis vin miaj amikoj“, diras Jesuo en la evangelio laŭ Johano. En la libereco de la amo ni povas elekti niajn amikojn kaj esti elektataj kiel tiaj. „Ne vi elektis min, sed mi elektis vin”, diras Jesuo al ĉiu el ni. La amikeco de Jesuo kun ĉiu el ni transformas kaj preterpasas niajn familiajn kaj sociajn rilatojn. Ĝi parolas pri la amo profunda kaj konstanta de Dio al ni.

La biblia ampoemo, la Alta Kanto, estis interpretita diversmaniere, kiel la amo de Dio al Izraelo, aŭ la amo de Kristo al sia Eklezio. Ĝi restas la atesto de la pasio inter geamantoj, kiu transpasas la barojn altruditajn de la socio. Dum la amantino diras al sia karulo: „Bruna mi estas, tamen bela”, ŝiaj vortoj sonas kiel peto: „Ne rigardu, ke mi estas bruna”. Sed la amanto rigardas kaj elektas la amon, samkiel faras Dio en Kristo. *Dalitoj* scias, ke kiam Dio metas sur ilin sian rigardon, tion li faras kun ĉi tiu sama pasia amo. „Mi nomis vin miaj amikoj”, tio estas formo de liberigo el la malhomeco kaj el la maljusteco altruditaj al ili de la kasta sistemo. Por *Dalito* en Hindio, hodiaŭ, fariĝi amiko de Jesuo estas respondo, kiu postulas karan prezon.

Kion postulas Dio el tiuj, kiujn li vokas iri kun li kaj esti liaj amikoj? En Hindio ĝi estas voko al la eklezioj ĉirkaŭbraki *Dalitojn* kiel samvalorajn amikojn de komuna amiko. Ĉi tiu invito esti amikoj kun la amikoj de Jesuo estas alia maniero kompreni la unuecon de la kristanoj por kiu ni preĝas. En la tuta mondo kristanoj estas vokataj esti amikoj al ĉiuj, kiuj batalas kontraŭ diskriminacio kaj maljusteco. La vojo al la unueco de la kristanoj postulas, ke ni iru humile kun Dio, kun Jesuo kaj kiel iliaj amikoj.

**Preĝo**

Ho Jesuo, ekde la unua momento de nia vivo, vi proponis al ni vian amikecon. Via amo ampleksas ĉiujn popolojn, precipe tiujn, kiuj estas ekskluditaj aŭ elpelitaj pro la homaj limigoj de kasto, raso kaj haŭtkoloro. Konfidoplenaj kaj certaj pri nia digno en vi, faru ke ni povu iradi en solidareco unuj kun la aliaj, kaj nin reciproke ĉirkaŭbraki en la Spirito, kiel infanoj de Dio la Patro. Dio de la vivo, gvidu nin al la justeco kaj al la paco. Amen.

**Demandoj por la persona pripenso**

Kiujn homojn en via komunumo Kristo vokis al la amikeco kun vi?

Kio malhelpas ke la amikoj Jesuo estu amikoj inter si?

Kiamaniere la fakto, ke oni estas amikoj de la sama Jesuo, estas defio por la disaj eklezioj?

**LA SESA TAGO: PAŜI PRETER LA BARILOJ**

**Legaĵoj**

*Rut 4,13-17: La posteuloj de Rut kaj Boaz*

Kaj Boaz prenis Ruton, kaj ŝi fariĝis lia edzino; kaj li envenis al ŝi, kaj la Eternulo donis al ŝi gravedecon, kaj ŝi naskis filon. Kaj la virinoj diris al Naomi: Benata estu la Eternulo, kiu ne lasis vin sen parenco hodiaŭ, kaj li estu fama en Izrael; kaj li estu al vi ĝojiganto, kaj prizorganto de via maljuneco; ĉar via bofilino, kiu amas vin kaj kiu estas al vi pli bona ol sep filoj, naskis lin. Kaj Naomi prenis la infanon kaj metis ĝin sur sian bruston kaj fariĝis ĝia vartistino. Kaj la najbarinoj donis al li nomon, dirante: Filo naskiĝis al Naomi; kaj ili nomis lin Obed. Li estas la patro de Jiŝaj, patro de David.

*Psalmo 113 (112),1-9: Dio, helpo de la bezonantoj*

Haleluja!
Gloru, sklavoj de la Eternulo,
Gloru la nomon de la Eternulo.
La nomo de la Eternulo estu benata
De nun kaj eterne.
De la leviĝejo de la suno ĝis ĝia malleviĝejo
Estas glorata la nomo de la Eternulo.
Alte super ĉiuj popoloj estas la Eternulo;
Super la ĉielo estas Lia gloro.
Kiu estas kiel la Eternulo, nia Dio,
Kiu sidas alte,
Kiu kliniĝas por rigardi
La ĉielon kaj la teron,
Kiu el la polvo restarigas mizerulon,
El la koto levas malriĉulon,
Por sidigi lin kun eminentuloj,
Kun la eminentuloj de lia popolo?
Li donas familion al senfruktulino,
Kaj faras ŝin ĝoja patrino de infanoj.
Haleluja!

*Efesanoj 2,13-16: Kristo rompis la intermuron de disigo*

Sed nun en Kristo Jesuo vi, iam malproksimaj, proksimiĝis en la sango de Kristo. Ĉar nia paco estas li, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la intermuron de disigo, en sia karno neniiginte la malamon, la leĝon de ordonoj en dekretoj; por krei en si el la du unu novan homon, tiel farante pacon; kaj por kunakordigi ambaŭ en unu korpo al Dio per la kruco, mortiginte per tio la malamon.

*Mateo 15,21-28: Jesuo kaj la virino Kanaana*

Kaj elirinte de tie, Jesuo foriris en la regionojn apud Tiro kaj Cidon. Kaj jen virino Kanaana, veninte el tiuj limlandoj, kriis, dirante: Ho Sinjoro, filo de David, kompatu min; mia filino estas terure turmentata de demono. Sed li ne respondis al ŝi eĉ unu vorton. Kaj alveninte, liaj

disĉiploj petis lin, dirante: Forsendu ŝin, ĉar ŝi krias post ni. Kaj li responde diris: Mi ne estas sendita, krom al la perditaj ŝafoj el la domo de Izrael. Sed ŝi venis kaj adorkliniĝis al li, dirante: Sinjoro, helpu min. Sed li responde diris: Ne decas preni la panon de la infanoj kaj ĵeti ĝin al la hundetoj. Sed ŝi diris: Jes, Sinjoro; ĉar eĉ la hundetoj manĝas el la panpecetoj, kiuj falas de la tablo de iliaj sinjoroj. Tiam responde Jesuo diris al ŝi: Ho virino, granda estas via fido; estu al vi, kiel vi volas. Kaj ŝia filino estis sanigita de post tiu horo.

**Komento**

Iradi humile kun Dio signifas iradi trans la barilojn, kiuj disigas kaj damaĝas la gefilojn de Dio. La kristanoj en Hindio konscias pri siaj internaj disiĝoj. La maniero, en kiu *Dalitoj* estas traktataj interne de iliaj eklezioj, rompas la biblian vizion pri la unueco por kiu ni preĝas. Apostolo Paŭlo travivis la detruajn disiĝojn de la unuaj kristanaj komunumoj inter judaj kristanoj kaj kristanoj devenantaj el diversaj etnaj grupoj. Pri ĉi tiu barilo, kaj ĉiu alia posta, Paŭlo asertas ke „nia paco estas Kristo, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la intermuron de disigo, en sia karno neniiginte la malamon” (Efe 2,14-15). Aliloke li skribas: „kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston. Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo” (Gal 3,27-28). En Kristo ĉiuj profundaj baroj de la malnova mondo - kaj de tiu moderna - estis forigitaj, ĉar sur la kruco Jesuo kreis en si mem novan homaron.

En mondo, en kiu la religiaj baroj estas ofte malfacile supereblaj, la kristanoj kiuj estas eta malplimulto en la multreligia kunteksto de Hindio, memorigas al ni la gravecon de la interreligia dialogo kaj de la kunlaboro.

La Evangelio laŭ Mateo rakontas al ni la malfacilan vojon de Jesuo - kaj de liaj disĉiploj - por superi la barojn de religio, de kulturo kaj de sekso, kiam li estis pridemandita de kanaana virino, kiu preĝpetis sanigi ŝian filinon. La instinkto de la disĉiploj ŝin forsendi, kaj la hezito mem de Jesuo, estas superataj de la fido de la virino, de ŝia bezono. Ekde tiam Jesuo kaj liaj disĉiploj kapablis superi la barojn kaj la limojn altruditajn de la malnova mondo. Tio jam ĉeestas en la hebrea Biblio. La libro de Rut, la moabida virino kun malsimila lingvo kaj kulturo, finiĝas per longa listo pri ŝia posteularo kun la izraelido Boaz. Ilia filo Obed estis patro de Jiŝaj, patro de Davido. La genealogio de la heroo-reĝo de malnova Izraelo reflektas la fakton, ke la volo de Dio povas esti plenumita kiam la popoloj superas la barojn de lingvo kaj kulturo. La irado kun Dio hodiaŭ postulas, ke ni superu la barojn, kiuj disigas la kristanojn inter si kaj disde la popoloj kun alia kredo. La irado survoje al la unueco de la kristanoj postulas, ke ni humile marŝu kun Dio preter la barojn kiuj nin disigas.

**Preĝo**

Ho Patro, pardonu nin pro la bariloj de avido, antaŭjuĝoj kaj malŝato, kiujn ni levas konstante, kaj kiuj disigas nin en nia interno kaj inter la eklezioj, disde homoj kun aliaj kredoj kaj disde tiuj, kiujn ni taksas malpligravaj ol ni. Igu Vian Spiriton doni al ni la kuraĝon transpasi ĉi tiujn barilojn kaj disbati la murojn kiuj nin disigas unuj de la aliaj. Faru ke poste ni povu, kun Kristo, antaŭeniri al nekonata lando, por porti lian mesaĝon de amema akcepto kaj de unueco al la tuta mondo. Dio de la vivo, gvidu nin al la justeco kaj al la paco. Amen.

**Demandoj por la persona pripenso**

Kiaj estas la baroj, kiuj disigas la kristanojn en via komunumo?
Kiaj estas la baroj, kiuj disigas la kristanojn de la aliaj religiaj tradicioj en via komunumo?
Kiaj estas la malsimiloj kaj la similoj inter la irado trans la barojn kiuj disigas la kristanojn inter si, kaj la irado trans la barojn kiuj disigas kristanismon disde la aliaj religioj?

**LA SEPA TAGO: PAŜI EN LA SOLIDARECO**

**Legaĵoj**

*Nombroj 27,1-11: La heredec-rajto por la filinoj*

Kaj aliris la filinoj de Celofĥad, filo de Ĥefer, filo de Gilead, filo de Maĥir, filo de Manase, el la familioj de Manase, filo de Jozef; kaj jen estas la nomoj de liaj filinoj: Maĥla kaj Noa kaj Ĥogla kaj Milka kaj Tirca; kaj ili stariĝis antaŭ Moseo kaj antaŭ la pastro Eleazar kaj antaŭ la estroj kaj la tuta komunumo ĉe la pordo de la tabernaklo de kunveno, kaj diris: Nia patro mortis en la dezerto, kaj li ne estis inter la anaro, kiu ribelis kontraŭ la Eternulo en la anaro de Koraĥ; sed pro sia peko li mortis, kaj filojn li ne havis. Kial malaperu la nomo de nia patro el inter la familio, ĉar li ne havis filon? Donu al ni posedaĵon inter la fratoj de nia patro. 5 Kaj Moseo prezentis ilian aferon antaŭ la Eternulon. Kaj la Eternulo diris al Moseo jene: Prave parolas la filinoj de Celofĥad; efektive donu al ili heredan posedaĵon inter la fratoj de ilia patro, kaj transirigu la posedaĵon de ilia patro al ili. Kaj al la Izraelidoj diru jene: Se iu mortos, ne havante filon, tiam transirigu lian posedaĵon al lia filino; kaj se li ne havas filinon, tiam donu lian posedaĵon al liaj fratoj; kaj se li ne havas fratojn, donu lian posedaĵon al la fratoj de lia patro; kaj se lia patro ne havas fratojn, donu lian posedaĵon al lia proksima parenco el lia familio, ke li heredu ĝin. Kaj tio estu por la Izraelidoj leĝa juro, kiel la Eternulo ordonis al Moseo.

*Psalmo 15(14), 1-5: Kiu loĝos en la sanktejo de Dio?*

Ho Eternulo, kiu povas gasti en Via tendo?
Kiu povas loĝi sur Via sankta monto? –
Tiu, kiu vivas honeste, agas juste,
Kaj parolas veron el sia koro;
Kiu ne kalumnias per sia lango,
Ne faras malbonon al sia kunulo,
Kaj ne ĵetas malhonoron sur sian proksimulon;
Kiu abomenas malnoblulon
Kaj estimas la respektantojn de la Eternulo,
Kiu faris ĵuron malprofite por si kaj ĝin ne rompas;
Kiu sian monon ne donas procentege,
Kaj subaĉetajn donacojn kontraŭ senkulpulo ne akceptas. –
Kiu tiel agas, tiu neniam falos.

*Agoj 2,43-47: La disĉiploj havis ĉion komunan*

Kaj ĉiu animo havis timon, kaj multaj mirakloj kaj signoj fariĝis per la apostoloj. Kaj ĉiuj kredantoj estis kune, kaj havis ĉion komuna; kaj ili vendis siajn havojn kaj posedaĵojn, kaj dividis ilin al ĉiuj laŭ ĉies aparta bezono. Kaj ĉiutage, vizitadante unuanime la templon, kaj dispecigante panon dome, ili prenis sian nutraĵon kun ĝojo kaj unueco de koro, laŭdante Dion kaj havante favoron ĉe la tuta popolo. Kaj la Sinjoro aldonis ĉiutage al la eklezio la savatojn.

*Luko 10,25-37: La bona Samariano*

Kaj jen unu leĝisto stariĝis, kaj tentis lin, dirante: Majstro, kion mi faru, por heredi eternan vivon? Kaj li diris al li: Kio estas skribita en la leĝo? kiel vi legas? Kaj li responde diris: Amu

la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem. Kaj li diris al li: Vi prave respondis; tion faru, kaj vi vivos. Sed li, dezirante pravigi sin, diris al Jesuo: Kaj kiu estas mia proksimulo? Jesuo respondis kaj diris: Unu homo malsupreniris de Jerusalem al Jeriĥo; kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin senvestigis kaj batis, kaj foriris, lasante lin duone senviva. Kaj laŭ okazo unu pastro malsupreniris la saman vojon; kaj lin vidinte, li preterpasis aliflanke. Kaj tiel same unu Levido, veninte al la loko kaj lin vidinte, preterpasis aliflanke. Sed unu Samariano, vojaĝante, alvenis tien, kie li estis, kaj lin ekvidinte, li kortuŝiĝis, kaj alproksimiĝis, kaj bandaĝis liajn vundojn, kaj surverŝis oleon kaj vinon; kaj li metis lin sur sian beston, kaj kondukis lin al gastejo, kaj zorgis pri li. Kaj la morgaŭan tagon li elprenis du denarojn kaj donis ilin al la gastejestro, kaj diris: Zorgu pri li, kaj kion pli vi elspezos, mi tion repagos al vi, kiam mi revenos. Kiu el tiuj tri, laŭ via opinio, sin montris proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de la rabistoj? Kaj li diris: Tiu, kiu faris al li kompaton. Kaj Jesuo diris al li: Iru vi, kaj faru tion saman.

**Komento**

Humile paŝi kun Dio signifas paŝi en solidareco kun ĉiuj, kiuj batalas por justeco kaj paco. Tio starigas demandon por tiuj, kiuj preĝas ĉisemajne por la unueco de la kristanoj: kiu estas tiu unueco, kiun ni serĉas? La komitato por fido kaj ordo, en kiu apartenas ankaŭ membroj de la komunumo de la Monda konsilantaro de eklezioj kaj la katolika Eklezio, komprenas unuecon kiel „videblan unuecon en unu kredo kaj en unu eŭkaristia komunumo.” La ekumena movado strebas venki la historiajn kaj nuntempajn barierojn, kiuj dividas kristanojn, sed ĝi faras tion kun la vizio de videbla unueco, kiu ligas la naturon kaj mision de la Eklezio en la servo por la unueco de la homaro kaj venko super ĉio, kio damaĝas la dignecon de la homoj kaj kio dividas nin. Kiel diris komitato por Fido kaj Ordo: „La Eklezio estas vokita kaj rajtigita partopreni en la suferado de ĉiuj homoj per tio, ke ĝi defendos ilin aŭ zorgos pri la malriĉuloj, suferantoj kaj marĝenigitoj. Ĉi tiu misio enhavas ankaŭ kritikan analizon kaj rekonsideron de la maljustaj strukturoj kaj strebon pri ilia transformiĝo… Ĉi tiu fidela atesto povas postuli de la kristanoj, ke ili suferos pro la evangelio. La Eklezio estas vokita resanigi kaj mildigi damaĝitajn homajn rilatojn kaj estiĝi la instrumento de Dio en la repacigo de la homa dividiĝo kaj malamo.” (Naturo kaj misio de la Eklezio)

Ekzistas multaj ekzemploj de ĉi tiuj agoj de resanigo kaj repaciĝo inter eklezioj en Hindio.
Unu el la ekzemploj povas esti barata heredec-leĝo, kiu forigis la rajton de filinoj je ilia heredaĵo. La eklezioj subtenis la postulon pri la nuligo de ĉi tiu eksmoda leĝo. La Biblia rakonto pri filinoj de Celofĥad, en kiu Moseo turniĝas al Dio por subteni la rajtojn de la filinoj, estis uzita por defendi la justecon por la virinoj. *Dalitaj* kristanoj estis instigitaj per ĉi tiuj Bibliaj atestoj en ilia strebo pri la justeco. Ili kuniĝis kun *Dalitoj* de aliaj kredokonfesoj kaj kun sekularaj retoj kaj sociaj movadoj en Hindio kaj en la mondo en ilia rezisto kontraŭ maljusteco. *Dalitoj* estis inspiritaj en ilia strebo por la justeco per la ekzemploj de aliaj movadoj por sociaj reformoj.

Biblia bildo de la Eklezio unuigita en solidareco kun la subpremitaj estas parabolo de Jesuo pri la bona Samariano. Simile kiel *Dalitoj* ankaŭ bona Samariano devenas de malamata kaj marĝenigita komunumo. En ĉi tiu rakonto nur li zorgas pri la viro, kiu estis forlasita rande de la vojo kaj li esprimas sian solidarecon per agoj, espero kaj konsolo de la evangelio. La paŝado al unueco de la kristanoj estas neapartigeble ligita kun la paŝado en la humileco kun Dio kaj en solidareco kun ĉiuj, kiuj bezonas justecon kaj mizerikordon.

**Preĝo**

Triunua Dio, en via vivo vi donis al ni unikan ekzemplon de interdependiĝo, amanta rilato kaj solidareco. Unuigu nin, por ke ni travivu niajn vivojn en ĉi tiu maniero. Instruu nin partopreni en la espero, kiun ni trovas en homoj, kiuj batalas por la vivo kie ajn en la mondo. Ilia persistemo kuraĝigu nin venki niajn proprajn dividiĝojn, por ke ni vivu en sankta harmonio unu kun la alia kaj kune paŝu en solidareco. Dio de vivo, venigu nin al justeco kaj paco. Amen.

**Demandoj por persona pripenso**

Kiu en via komunumo bezonas solidarecon de kristana komunumo?

Kiuj eklezioj estis aŭ estas solidaraj kun vi?

Kiamaniere la pli videbla unueco inter kristanoj povas plibonigi la solidarecon de la Eklezio kun tiuj, kiuj bezonas justecon kaj mizerikordon en via ĉirkaŭaĵo?

## LA OKA TAGO: PAŜI KUNE EN LA CELEBRADO

### Legaĵoj

*Ĥabakuk 3,17-19: Celebri en momento de malfacilo*

Kiam la figarbo ne floros,
La vinberbranĉoj ne donos fruktojn,
La olivarbo rifuzos sian laboron,
La plugokampoj ne donos manĝaĵon,
La ŝafoj estos forkaptitaj el la ŝafejo,
Kaj en la staloj ne troviĝos bovoj:
Eĉ tiam mi ĝojos pri la Eternulo,
Mi estos gaja pri la Dio de mia savo.
La Eternulo, la Sinjoro, estas mia forto;
Li faras miajn piedojn kiel ĉe cervo,
Kaj venigas min sur miajn altaĵojn.
Al Li, la Venkanto, iru miaj kantoj.

*Psalmo 100 (99),1-5: La kulto al la Sinjoro sur la tuta tero*

*Psalmo de dankado.*

Ĝoje kriu al la Eternulo la tuta tero!
Servu al la Eternulo kun ĝojo,
Venu antaŭ Lian vizaĝon kun kanto.
Sciu, ke la Eternulo estas Dio;
Li nin kreis, kaj al Li ni apartenas,
Lia popolo kaj ŝafoj de Lia paŝtejo.
Eniru en Liajn pordegojn kun dankado,
En Liajn kortojn kun laŭdado.
Gloru Lin, benu Lian nomon;
Ĉar la Eternulo estas bona;
Lia favorkoreco estas eterna,
Kaj de generacio al generacio daŭras Lia fideleco.

*Filipianoj 4,4-9:* Ĝoju en la Sinjoro ĉiam

Ĝoju en la Sinjoro ĉiam; denove mi diros: Ĝoju. Via mildeco estu konata al ĉiuj. La Sinjoro estas proksima. Pri nenio trozorgu; sed pri ĉio, per preĝo kaj peto kun dankesprimo, viaj deziroj sciiĝu al Dio. Kaj la paco de Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardos viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo. Fine, fratoj, kio ajn estas vera, kio ajn honesta, kio ajn justa, kio ajn ĉasta, kio ajn ŝatinda, kio ajn bonfama; se estas ia virto, se estas ia laŭdo, tion pripensu. Kion vi lernis kaj ricevis kaj aŭdis kaj vidis en mi, tion faru; kaj la Dio de paco estos kun vi.

*Luka 1,46-55: La kantiko de Maria*

Kaj Maria diris:
Mia animo altigas la Eternulon,
Kaj mia spirito ĝojis en Dio, mia Savanto,

Ĉar li rigardis la humilecon de Sia sklavino;
Ĉar jen de nun ĉiuj generacioj nomos min feliĉa.
Ĉar la Potenculo faris al mi grandaĵojn,
Kaj sankta estas Lia nomo.
Kaj Lia boneco estas por ĉiuj generacioj
Al tiuj, kiuj Lin timas.
Li montris forton per Sia brako,
Li dispelis fierulojn en la penso de ilia koro.
Li malaltigis potenculojn de iliaj tronoj,
Kaj Li altigis humilulojn.
Malsatulojn Li plenigis per bonaĵo,
Kaj riĉulojn Li forsendis malplenaj.
Li helpis Sian servanton Izrael,
Memorante Sian korfavoron.
Kiel Li parolis al niaj patroj,
Al Abraham kaj al lia idaro eterne.

**Komento**

Iradi humile kun Dio signifas iri en festo. Vizitantoj al Hindio estas trafitaj de la malfacilaĵoj kaj bataloj kiujn *Dalitoj* devas travivi, sed samtempe de ilia sento por espero kaj festado. Apud la fervoja stacidomo proksime al Bangalore troviĝis unu kvartalaĉo loĝata de multenombraj *Dalitoj* kaj de aliaj malaltaj klasoj, migrantaj laboristoj el Tamilnadu venintaj por konstrui la fervojon je la tempo de la hinda sendependiĝo. Post kiam en la fruaj 80-aj jaroj la loĝkomunumo estis minacata pri elloĝigo fare de la fervojkompanio, la komunumo - pere de sia ina gvidantaro – organiziĝis tiel ke ili sukcesis trovi novan teron kaj ekkonstrui novajn fiksajn loĝejojn por preskaŭ mil homoj. La komunumo de *Dalitoj* kaj de aliaj translokiĝis al siaj novaj domoj, kiujn ili mem pagis, en la jaro 2011. Tio estas nur unu ekzemplo de la batalado kontraŭ maljusteco, farita kun granda espero, kiu meritas esti festata.

Espero kaj festo aperas kune en la hodiaŭaj bibliaj legaĵoj. Profeto Ĥabakuk gloras la Eternulon en momento de sekeco kaj de malriĉa rikolto. Tia atesto, ke Dio kuniros kun sia popolo en iliaj malfacilaĵoj, estas festo de espero. Beata Virgulino Maria iras al sia kuzino Elizabeta por ĝojegi pro sia gravedeco. Ŝi kantas Magnificat kiel kanton de espero eĉ antaŭ la naskiĝo de la infano. El la malliberejo Paŭlo instigas al la ĝojo la kristanan komunumon en Filipio: „Ĝoju en la Sinjoro, ĉiam ĝoju“. En la Biblio, ĉiu festo estas kunligita kun espero je la Dia fideleco.

La festaj aspektoj de la *dalita* kulturo proponas analogan ateston pri fido kaj espero, elfaritan je la fajra elprovo de la *dalita* sperto pri batalado por digno kaj rezistema transvivo. Dum ni preĝas por la unueco de la kristanoj, ni turnu niajn okulojn al la vivĝojo kiun ni vidas en Hindio, precipe al la fideleco de *Dalitoj* al sia kristana identeco, eĉ en sia bataldo por transvivo. Ankaŭ nia celebrado de la ankoraŭ atingota unueco inter kristanoj okazas en la espero kaj en la batalado. Ĝi radikiĝas en la espero ke la preĝo de Jesuo ke ni estu unu estos plenumita en la tempoj de la Sinjoro kaj per liaj rimedoj. Ĝi radikiĝas en la dankemo ĉar la unueco estas donaco de Dio, kaj en la rekono de la unueco kiun jam ni spertas kiaj geamikoj de Jesuo, esprimita en la ununura Bapto. Ĝi baziĝas sur la konvinkiĝo ke Dio vokas ĉiun el ni labori por la unueco, kaj ke ĉiu nia strebo estos valorigata de Dio, fidante, samkiel apostolo Paŭlo: „Turnu vin al Dio, insiste petu de li tion kion vi bezonas, kaj danku lin”. Iradi al la unueco de la kristanoj postulas, ke ni humile iru kun Dio en la celebrado, en la preĝo kaj en la espero.

**Preĝo**

Gracoplena Dio, donu ke via Spirito enverŝu en niajn komununojn la ĝojon kaj la feston, por ke ni povu ĝoji pro la unueco kiun ni jam kundividas, kaj kun fervoro ni daŭrigu la serĉadon de la videbla unueco. Ni ĝojas pro la fido kaj espero de tiuj popoloj, kiuj ne permesas ke oni malrespektu ilian dignon, vidante en ili vian mirindan gracon kaj vian fidelan promeson pri libero.
Instruu al ni kundividi ilian ĝojon kaj lerni el ilia fidela persistemo. Revigligu en ni la esperon kaj subtenu nian animdisponon, ke en la nomo de Kristo ni povu kune iri en la amo, levante unuaniman voĉon de laŭdo kaj ekkantante kune kanton de preĝo kaj de adoro. Dio de la vivo, gvidu nin al la justeco kaj al la paco. Amen.

**Demandoj por persona pripenso**

Kiaj estas la bataloj por justeco en via komunumo? Kiaj estas la kialoj por festado sur ĉi tiu vojo?

Kiaj estas la bataloj por la unueco de la kristanoj en via komunumo? Kiaj estas la kialoj por festado sur ĉi tiu vojo?

## ENKONDUKO AL KRISTANISMO EN HINDIO: LA KUNTEKSTO POR LA EKLEZIOJ[2]

La eklezioj en Hindio havis kompleksan kaj riĉan historion. La kristana loĝantaro ankoraŭ estas multe okupata pri la vivo de la lando, precipe en la fakoj de edukado kaj sanzorgo, heredaĵoj de la kristana misiista movado kiu komenciĝis en la jaroj 1500aj. Per ĉi tiuj servoj, kaj per konvertiĝoj al kristanismo, la ĉefa kontribuo farita de la misioj estis povigi la sociale diskriminaciatajn sekciojn de la hinda socio akiri dignon kaj memrespekton. Kristanismo estas la tria plej granda religio de Hindio kun proksimume 24 milionoj da sekvantoj aŭ proksimume 2,3% el la loĝantaro de 1,2 miliardoj da homoj. Ĉi tiuj estas la ciferoj bazitaj sur la censo de 2001: la rezultoj de la censo de 2011 - kiu ankoraŭ daŭras - sugestas marĝenan pliigon de la nombro de kristanoj en Hindio. El la kristana loĝantaro, la plej granda nombro aliĝas al la Romkatolika Eklezio. Eklezioj en la orienta tradicio inkluzivas la Malankaran Ortodoksan Sirian Eklezion, la Malabaran Sendependan Sirian Eklezion, la Malankaran Jakobanan Sirian Eklezion, la Malankaran Sirian de Mar Thoma, kaj la Sirian-Malabaran Katolikan Eklezion kiuj estas gravaj en Keralo. Inter la ĉefaj protestantaj konfesioj estas la Eklezio de Suda Hindio (CSI), la Eklezio de Norda Hindio (CNI), presbiterianoj, baptistoj, luteranoj kaj evangeliismaj komunumoj.

Lastatempe, estis disputo pri la maniero laŭ kiu la historio de la hindaj eklezioj estas prezentita, nome kiel deveninta en la misiistaj movadoj de Okcidento. Surbaze de la supozo, foje farita, ke en la lastaj jaroj la centro de kristanismo translokiĝas al la Sudo, Ninan Koshy skribas: „Tiuj, kiuj diras ke la tago de Suda Kristanismo nun mateniĝas, ŝajne ne konscias ke la mateniĝo de kristanismo estis en la Sudo... Tio, kio okazas, ne estas la etendiĝo de okcidenta religio sed la renaskiĝo de religio kiu estas azia laŭ ĝiaj deveno kaj frua historio.“[3]

Laŭ la tradicio de la Mar Thoma aŭ la Eklezio de Tomaso, „Sankta Tomaso evangelizis laŭlonge de la Malabara Marbordo de ŝtato Keralo en sudokcidenta Hindio. Laŭdire, li predikis al ĉiuj klasoj de homoj kaj havis proksimume dek sep mil konvertitojn, inter ili membrojn de la kvar ĉefaj kastoj. Laŭlegende, sankta Tomaso estis martirigita ĉe Cennajo, kaj katedralo San Thome nun situas sur lia tombo. Koshy citas la faman azian historiiston K.M. Panikkar kiu diris ke Kristanismo ekzistis en diversaj partoj de Persio, Hindio kaj Ĉinio de la plej fruaj tempoj. La eklezio en Malabaro asertas apostolan devenon de sankta Tomaso, kaj ĉiaokaze ĝia ekzisto estas atestita fare de eksteraj aŭtoritatoj tiom frue kiom 182 p.K.“.

Tiuj fruaj hindaj kristanoj, kiuj kontaktiĝis kun tiu orient-siria (persa) tradicio, hodiaŭ nomiĝas la Eklezio de Oriento aŭ la Kaldea Eklezio. Estas pli malfruaj indikoj, ke nestorianaj kristanoj, kiuj aktivis en Persio, atingis Ĉinion en la sepa jarcento. [4] De tio oni povas dedukti, ke nestorianaj negocistoj kaj misiistoj, kaj aliaj el Sirio, venis al Hindio en tiuj fruaj jarcentoj. Ĉi tio estas la deveno de la ortodoksaj eklezioj en Hindio, kiuj ankoraŭ hodiaŭ estas forta kaj fidela ĉeesto en Hindio. En la sekvintaj jarcentoj, aliaj grupoj el Sirio, Persio kaj Babilonio pliigis la kristanan ĉeeston kaj la unua romkatolika misiisto, Jordanus Catalani, establis diocezon frue en la dekkvara jarcento.

---

[2] Ĉi tiu teksto estas reproduktita sub la sola aŭtoritato kaj respondeco de la ekumena grupo en Hindio kiu renkontiĝis por verki la fontotekstojn por la Preĝosemajno por la Unueco de la Kristanoj de 2013.

[3] Ninan Koshy, A History of the Ecumenical Movement in Asia, Volume I. Honkongo: Christian Conference of Asia, Asia-Pacific WSCF, 2004. p.6

[4] Ninan Koshy, A History of the Ecumenical Movement in Asia, Volume I. Honkongo: Christian Conference of Asia, Asia-Pacific WSCF, 2004. p. 10

***La historio de la misioj kaj la anticipo de la ekumena movado***

Kiel supre menciite, la alia grava fluo da hinda kristanismo estas ligita kun misiista agado kiu koincidis kun la projekto de koloniado kaj la establo de eŭropaj potencoj en Hindio. Romkatolika misiista agado komenciĝis sub la portugalaj kolonianoj en la finaj jaroj de la 15a jarcento kaj daŭris sub figuroj kiel sankta Francisko Xavier kaj liaj jezuitaj kolegoj. Kvankam la unua Protestanta misio venis al Hindio ĉe Tranquebar en 1706, la deknaŭa jarcento vidis gravan evoluadon de Protestantaj misioj. Oni ĝenerale konsentas, ke la okcidenta misiista movado faris gravan kontribuon al la kresko de kristanismo en Hindio.

La historio de la misioj en Hindio estas kompleksa mozaiko - nelaste pro la vasteco de la lando kaj la multego de misiiistaj agentejoj kiuj provis establi sin ĉi tie. Ĉiu venis kun siaj antaŭkonceptoj kaj doktrinaj diferencoj kaj kun siaj propraj interrilatoj kun la koloniantaj potencoj. Komencinte kun ununura celo, nome evangelizi, la misioj tamen baldaŭ agnoskis ke ili ankaŭ devas transdoni edukadon kaj kapablojn al lokaj loĝantaroj kaj ankaŭ okupiĝi pri la evoluado de la homoj kiuj petas konvertiĝon al la kristana fido. La fruaj klopodoj de la misiista movado por liveri sanon al la popolo fariĝis la modelo por la sanzorgaj sistemoj de la lando post kiam Hindio akiris sendependecon en 1948.

Per sia subteno al la edukaj programoj de la misiistoj, la kolonia registaro celis krei ordemajn kaj disciplinitajn civitanojn kiuj povos ofici en ĝia administracia aparato. Sed la kulturaj kaj sociaj efikoj de la predikado kaj konstruado de komunumoj fare de la misiistoj inkluzivis emfazon pri homaj rajtoj, foje helpitan de la misiistoj mem. Ĉi tiuj klopodoj kontribuis al la formado de hinda popolo kiuj sentis sin kapabla kritiki aktualajn sistemojn kaj protesti kontraŭ la maljusteco de la koloniisma regado kaj kulminis per lukto por liberiĝo el la koloniismo.

Gravas ankaŭ mencii la grandegan kreskon de kristanismo kaj la establon de eklezioj en nordorienta Hindio, kiu kovras sep ŝtatojn norde kaj oriente de Bangladeŝo kaj ligigas al la cetero de Hindio tra la ŝtato Okcident-Bengalo. En ĉi tiuj ŝtatoj, 90 procentoj el la loĝantaro de Nagalando, 87 procentoj de Mizoramo kaj 71 procentoj de Meghalajo estas kristanoj. Kun la apogo kaj subteno de la koloniaj regantoj, la Baptista Misio de Usono kaj la Presbiteriana Misio de Kimrio komencis sian laboron proksimume en 1816 ĉe la plejparte tribaj (aŭ indiĝenaj) loĝantaroj kiuj loĝas en ĉi tiu regiono. Hodiaŭ, la radikoj de du trionoj de la kristanoj en ĉi tiuj ŝtatoj devenas de ĉi tiuj du misioj. Romkatolikaj misiistoj alvenis tie en 1850 kaj, en la daŭro de jarcentoj, kontribuis al la evoluado de la eduka infrastrukturo de la regiono. En la periodo post la Dua Mondmilito, pentekostanoj kaj similaj grupoj kaj misioj alvenis en la regiono, influante formojn de adoro kaj spiritualeco en ĉi tiuj ŝtatoj. La evoluado de indiĝenaj ekleziaj strukturoj en ĉi tiu regiono, kune kun la ekskludo de fremdaj misiistoj fare de la hinda registaro el ĉi tiu politike tikla regiono, certigis la evoluadon de kristanismo enradikiĝinta en la kulturo de la indiĝenaj gentoj. La Kristana Konsilio de Nordorienta Hindio kaj la Nacia Konsilio de Eklezioj en Hindio kontribuis al ekumenaj klopodoj en ĉi tiu regiono.

Alia ŝtato, kie la kristana loĝantaro estas forta, estas Keralo, kie proksimume 20 procentoj de la popolo estas kristanoj. Inter ili, tri milionoj da kredantoj estas ortodoksaj kristanoj. Ekde la kvara jarcento, ĉi tiuj kristanoj havis ligilojn kun la siria patriarkeco de Antioĥio, de kiu estiĝis en Hindio la okcidenta siri-lingva liturgia kaj eklezia ordo de la siria ortodoksa tradicio. Ĉi tiun ligon konservas tiuj, kiuj aliĝas al la Malankara Jakobana Siria Ortodoksa Eklezio. Aliaj ortodoksaj kristanoj asertas, ke la antioĥia konekto komenciĝis nur en la 16a jarcento; tiuj, kiuj tenas ĉi tiun pozicion, konsistiĝas la Malankaran Ortodoksan Sirian Eklezion (ankaŭ nomata la Hinda Ortodoksa Eklezio) kiu fariĝis aŭtokefala Eklezio sekve de la establo de hinda katolikoseco en 1912. En la 16a jarcento, romkatolikaj misiistoj atingis Keralon kaj establis la Sirian-Malabaran Katolikan Eklezion. Sub la influo de protestantaj misiistoj laborantaj ĉe la siriaj kristanoj, la Siria Eklezio Mar Thoma de Malabaro leviĝis kiel aparta komunumo frue en la 19a jarcento.

*La ekumena movado en Hindio*

Oni povas diri, ke la misiista movado en Hindio efikis sur la ekumenan movadon laŭ du manieroj kun tre malsamaj rezultoj. Unue, ĝi estigis la sopiron al unueco kaj komuna agado inter la eklezioj. La kresko de la tutmonda ekumena movado instigis gravajn ekumenajn evoluojn ankaŭ en Hindio. Inter ili, rimarkindaj estis la naskiĝo de la Eklezio de Suda Hindio en 1947 - la unua esprimo de organika unio de eklezioj ie ajn en la mondo - kaj, kelkajn jarojn poste, la starigo de la Eklezio de Norda Hindio. Ĝi ankaŭ enkondukis aliajn gravajn ekumenajn instrumentojn - la Kristanan Asocion de Junaj Viroj, la Kristanan Asocion de Junaj Virinoj, la Nacian Konsilion de Eklezioj en Hindio kaj la Konferenco de Katolikaj Episkopoj de Hindio kune kun la Movado de Kristanaj Studentoj kaj la Tut-Hindia Katolika Universitata Federacio. Due, tamen, ĝi ankaŭ alportis al Hindio hereditajn konfesiajn identecojn. „Malfeliĉe, antaŭ ol fariĝi, antaŭ ĉio, konfesanta eklezio en la misiista situacio, la pli junaj eklezioj tro frue ĵetiĝis en situacion 'konfesian' kiu ne estis sia propra. Antaŭ ol ili fariĝis Komunumo de Kristo, oni diris ke ili devas fariĝi presbiteriana, luterana, metodista aŭ anglikana eklezio.“ [5]

En 1965, la Dua Vatikana Koncilio enkondukis novan spiriton de dialogo inter la Romkatolika Eklezio kaj la aliaj eklezioj kiu pliigis kunlaboron inter ili ankaŭ en Hindio. La Konferenco de Katolikaj Episkopoj en Hindio kunlaboras kun la Nacia Konsilio de Eklezioj, precipe pri rilatoj kun la registaro. Hodiaŭ, ili kampanjas por interveno fare de la registaro kiam kristanoj estas celataj en komunaj tumultoj; ili kunlaboras pri leĝo por protekti la rajtojn de nacimalplimultoj, kiuj inkluzivas la rajtojn de *dalitaj* kristanoj, kaj religian liberecon.

Dum eklezioj tutmonde sin preparas celebri la Preĝosemajnon por la unueco de la kristanoj en 2013, la eklezioj en Hindio festas siajn proprajn gravajn ekumenajn mejloŝtonojn. Antaŭ cent jaroj, en 1912, la Movado de Kristanaj Studentoj de Hindio (SCMI), la plej malnova junulara ekumena organizaĵo de studentoj en Hindio, komenciĝis kiam grupo de studentoj kunvenis por tut-hindia konferenco de studentoj aranĝita de la Kristana Asocio de Junaj Viroj (YMCA) ĉe Serampore College en Okcidenta Bengalo. Membroj de la hinda YMCA decidis krei apartan unuon por studentoj. Sekve de diskutoj ĉe la kunsido en Serampore, naskiĝis organizaĵo por hindaj studentoj, sendependa de la YMCA. Dum la lastaj cent jaroj la SCMI servis al kunfrataro el studentoj, instruistoj kaj amikoj de la movado por traduki la kristanan fidon en agadon. Disvastiĝinta en 13 geografiaj regionoj de la lando, SCMI dum sia tuta ekzisto inspiris studentojn partopreni la transformon de la eklezio kaj la socio. La SCMI nutris valorojn de ekumenismo, unueco, justeco kaj paco. Ĝi formis junajn gvidantojn kun la kvalitoj de fideleco al iliaj principoj kaj sindevontigo. La SCMI instigas partnerecon kun ĉiuj ekleziaj tradicioj, kun popoloj de ĉiuj fidoj, kaj kun aliaj junularaj ekumenaj organizaĵoj kiel la YWCA kaj la Tut-Hindia Katolika Universitata Federacio (AICUF). Ĝi estas filio de la Monda Federacio de Kristanaj Studentoj (WSCF).

En la preparo de la materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanaj en 2013, grava kunlaboranto estis la junulara fako de la Nacia Konsilio de Eklezioj en Hindio (NCCI). La NCCI estas la unuigita esprimo de la Protestantaj kaj Ortodoksaj eklezioj en Hindio kaj reprezentas 13 milionojn da kristanoj tra la tuta lando. Ĝi provizas platformon por pensado kaj agado per la arigo de la eklezioj kaj aliaj kristanaj organizaĵoj por reciproka konsulto, helpo kaj agado en ĉiuj aferoj rilatantaj al la kristana vivo kaj atesto en Hindio. Ortodoksaj kristanoj havis pivotan rolon en la ekumena movado en Hindio. Grave, la NCCI ankaŭ festos sian jarcentiĝon en 2014. Dum la pasintaj 100 jaroj, la Konsilio kaj ĝiaj membroj aktive okupiĝis pri la konstruado de la nacio. Ĝi estas memstara konsilio kiu brakumas, antaŭenigas kaj kunordigas la diversajn pastrajn agadojn de la eklezioj. La Junulara Komisiono de la NCCI antaŭenigas la ekumenan kaj interreligiajn aktivaĵojn je nacia nivelo.

---

[5] Hans-Ruedi Weber, Out of all Continents and Nations: A Review of Regional Developments in the Ecumenical Movement, A History of the Ecumenical Movement Volume 2, 1948-1968, Volume 2, 1948-1968, Harold C.Fey red. (Genevo: World Council of Churches, 1970. p.72-73

La tria kunlaboranto en la preparo de la materialoj por la Preĝosemajno estas la Tut-Hindia Katolika Universitata Federacio (AICUF), movado de katolikaj studentoj kun vizio de nova kaj justa socio. Fondita en 1915 kiel la Gildo de Junaj Katolikaj Viroj (CYMG), ĝi fariĝis la AICUF en 1949 kiel nacia studenta movado. Ĝi estas agnoskita de la Konferenco de Katolikaj Episkopoj de Hindio kaj estas filio de la Pax Romana, la Internacia Movado de Katolikaj Studentoj. Dum la pasintaj jaroj, la AICUF trairis historion de konstanta retrovo kaj rekreo dum ĝi provis trakti la novaperintajn bezonojn kaj realaĵojn de la universitato, la Eklezio kaj la pli larĝa socio de Hindio. AICUF ankaŭ kunlaboris kun la SCM kaj aliaj junularaj movadoj en Hindio pri demandoj kiuj efikas sur la vivon de la lando.

### *Fariĝi la Eklezio en Hindio*

Kristanismo alfrontas du gravegajn aferojn en Hindio: kastismo kaj identeco.
Kastismo, kaj ene de kaj inter la eklezioj, prezentas severajn defiojn por la unueco de la kristanoj en Hindio, kaj sekve por la morala kaj eklezia atesto de la eklezio kiel la unu korpo de Kristo. Kiel malakordiga afero inter la eklezioj, kastismo sekve estas akuta doktrina demando.

Tial, ĉi tiu afero estas elektita por reliefigi la manierojn laŭ kiuj la serĉo por justeco kaj paco estas esenca parto de la preĝo por kristana unueco. Kiel preĝejo-dividanta problemo, kastismo estas konsekvence akra doktrina temo. Laŭe, tiu demando estis elektita por reliefigi la manierojn en kiuj la serĉo por justeco kaj paco estas apriora al preĝado por kristana unueco.

La hindaj eklezioj de misia deveno klopodis por malaliĝi de sia misiista pasinteco kaj aserti sian propran identecon kaj vokitecon kiel eklezio hinda. La hinda ekumenisto M.M. Thomas, agnoskante la neeviteblan ligon kun okcidenta kulturo pro la jaroj da koloniisma regado, asertas ke, kiel kristanoj en Hindio, ni estas vokita al kritika engaĝigo kun la naciaj aspiroj de nia lando, kiel eklezioj kunlaborantaj: Kristanoj ne nepre pardonpetu pro sia konekto kun okcidenta kulturo. Sed kristanoj devas pardonpeti pro sia senpripensa pritrakto de okcidenta kulturo. Hodiaŭ, kiam niaj naciaj celoj estas okcidentaj, ni ne povas ilin taksi kritike en la nomo de Kristo. Sekve, nia kontribuo al „sekulara“ ekumenismo dependas de tio, ke ni mem havu „kristanan“ ekumenismon. [6]

La eklezioj en Hindio provis difini tion, kion ĉi tio signifas por ilia vivo kaj atesto en multreligia kunteksto kie kristanoj estas tre malgranda malplimulto. Situante meze de grandaj vivantaj fidoj, kristanoj en Hindio faris gravan kontribuon per la provizo de kvalifikita gvidanteco kaj teologia freŝeco al ekumenaj diskutoj pri dialogo kaj kunlaboro kun alikredantoj.

### *La historio de la eklezio laŭ la vidpunkto de la plimulto en la eklezio*

La plej grava kontribuo de la misiisto movado pri konvertigoj al kristanismo estis la maniero laŭ kiu multaj el la malriĉuloj kaj parioj en Hindio spertis konvertiĝon al Kristo kiel liberigon de religia kaj rita diskriminacio. Ĉe lastatempa internacia kolokvo, la eminenta verkisto kaj sociologo prof. d-ro Susie Tharu deklaris, ke „la genio de la hinda eklezio estas ĝia *dalit*-eco“. [7] Oni diras ke 80-90% el la hinda eklezio estas de *dalita* deveno. En iuj partoj de Hindio, 100% el la kristanoj estas *dalitaj* konvertitoj.

---

[6] MM Thomas, The Common Evangelistic Task of the Churches in Asia, Papers and Minutes of the EACC. Prapat, Indonezio, 1957. Citita de Koshy, supre citita. p. 28

[7] Susie Tharu en sia adiaŭa parolado ĉe internacia kolokvo pri kasto, religio kaj kulturo, organizita de la Monda Konsilio de Eklezioj, la Centro por Sociaj Studoj kaj Kulturo, la Nacia Konsilio de Eklezioj en Hindio kaj la Movado de Kristanaj Studentoj en Hindio, Cochin, Keralo, 1-4 majo 2011. Gravas nelonge difini kiu estas dalito en Hindio. La kasta strukturo de Hinduismo estas kvar-nivela kaj hierarkia - la bramanoj aŭ pastra kasto; la kastrioj aŭ regantoj kaj batalantoj; la vaisjoj aŭ negocistoj; kaj la sudroj aŭ laboristoj. La unuaj tri estas la rite puraj kaj ekonomie superregaj kastoj nomataj la „dufoje naskiĝintaj“. La kvara estas rite suspektindaj kaj ekonomie

Unuflanke, la demando pri konvertigo estas defio en la tutmonda areno, kie interreligiaj rilatoj devas esti ekvilibrigitaj kun la alvoko proklami la Evangelion. Aliflanke, *Dalitoj* en Hindio asertus ke la konvertigo de *Dalitoj* el hinduismo estas grava formo de *dalita* malkonsento. Je la komenco de la unua mondmilito, proksimume unu miliono el la kristanoj en Hindio estis *Dalitoj*; hodiaŭ ili estas proksimume dudek kvar milionoj. Konvertiĝoj al kristanismo, ofte faritaj laŭ la peto de subpremataj pariaj grupoj mem, defiis ne nur hindojn de la supraj kastoj, sed ankaŭ konvertitojn al kristanismo de la supraj kastoj, kaj eĉ la misiistojn mem.[8] Bedaŭrinde, ĉi tiu historio estas ricevinta nesufiĉan atenton: „La historio de *dalitaj* kristanoj nur estis tre negrava subintrigo en la multe pli grandaj historioj ĉu de misioj ĉu de eklezioj.“ [9]

*Dalitoj* ankoraŭ spertas subpremon kaj ekskludon tiom, ke ili povas agnoski pli grandan senton de identeco kaj komuna lukto kun *Dalitoj* de aliaj fidoj ol ene de la kristana komunumo. Kiel la lukto kontraŭ rasapartismo en Sud-Afriko, ĉi tiu skandalo devas defie instigi ĉiujn kristanojn demandi al si pri la limoj kaj sincereco de sia sindevontigo al kristana unueco.

### *La eklezioj restas devontigitaj*

Meze de multaj defioj, la eklezioj en Hindio provis resti fidelaj al sia kurso kaj malrapide kreskas - dum ili daŭre plifortigas ekumenajn partnerecojn kaj forĝas novajn sferojn de pastra agado. Kiel malplimulto, la eklezioj estas foje puŝitaj en transvivan agmanieron kaj ne al konsciaj kaj aŭdacaj asertoj de sia atesto en Hindio. Kristana ĉeesto en Hindio devas esti konstruata kiel „la estonteco de la senesperuloj... La Kruco de Kristo, la komunumo de la suferanta Kristo, kaj la signo de la subpremata kreitaro, montras al ni la lokon de la kristana ĉeesto“. [10]

---

superregataj kaj estas la „unufoje naskiĝintaj“. Ekster ĉi tiu strukturo estas la 160-180 milionoj nur en Hindio kiujn oni finomas la „eksterkastuloj“, „netuŝebluloj“, la „ekstera kasto“, la „subremata kasto“, „parioj“ aŭ la dalitoj. La terminon dalitoj oni ne uzas por signifi alian kastan identecon; male ĝi celas nomi kontraŭkastan kolektivan movadon. Por ĉi tiu klarigo, legu la artikolon de Sathianathan Clarke, 'Dalit theology: An Introductory and Interpretive Theological Exposition', en 'Dalit Theology in the Twenty-first Century, Discordant Voices, Discerning Pathways'. Red. Sathianathan Clarke, Deenabandhu Manchala and Philip Vinod Peacock, Nov-Delhio: Oxford University Press, 2010), p. 4-5.

[8] Vidu ekzemple Stanley, Brian, 2009, 'The World Missionary Conference, Edinburgh, 1910', Studies in the History of Christian Missions, William B. Eerdmann‘s Publishing Company, Grand Rapids, Micigano/Kembrigo, Britio. p.153-154

[9] Webster John C.B., - 'Dalit Christian History: Themes And Trends', referaĵo prezentita ĉe la Universitato Jawaharlal Nehru, Fako pri Historio, februaron 2011, Nov-Delhio. Manuskripto. John Webster estas amplekse verkinta pri la historio de dalitaj kristanoj, interalie en pionira verko 'The Dalit Christians, a History', 1992, ( kiu atingis sian trian eldonon). Edwin Ellen Press, San-Francisko

[10] Jurgen Moltmann, Theology Today, Vol 28 No. 1, aprilo 1971, 6-23. Princeton Theological Seminary, Westminster John Knox Press, Usono

**KELKAJ GRAVAJ DATOJ ŜLOSILAJ DATOJ EN LA HISTORIO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ**

- ĉ. 1740: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezioj
- 1820: Sac. James Haldane Stewart publikigis „Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluo de la Spirito“ (Hints for the outpouring of the Spirit)
- 1840: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas „Unuiĝon de preĝado por Unueco“
- 1867: La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj
- 1894: Papo Leono la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto
- 1908: Unua okazigo de la „Preĝosemajno por la unueco de Eklezio“ en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson
- 1926: La Movado „Fido kaj Konstitucio“ komencas publikigon de „Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj“ okaze de Pentekosto
- 1935: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por „unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras“
- 1941: Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono
- 1958: La Ekumena centro „Kristana unueco“ el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj
- 1964: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu“(Joh 17, 21)
- 1964: La „*Dekreto pri ekumenismo*“ de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco
- 1966: La Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno
- 1968: la unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio“ kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)
- 1975: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis la ekumena grupo el Aŭstralio
- 1988: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando
- 1994: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)
- 2004: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita
- 2008: n la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj
- 2010: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado